

Budhismaj Tradukoj

(6)

**SUTRO
DE CENT PARABOLOJ**

百喻经

Budhana Retejo Esperantista

<http://www.budhano.cn>

SUTRO DE CENT PARABOLOJ

**Verkis Sangasena
Ĉinigis Gunavridi**

Esperantigis Miaohui

BUDHANA RETEJO ESPERANTISTA

<http://www.budhano.cn>

Prefaco.....	1
1. Manĝi salon.....	4
2. Melki bovinon.....	5
3. Vundiĝo pro piroj.....	6
4. Virino sin ŝajnis morta.....	7
5. Soifa malsaĝulo.....	9
6. Malsaĝulo kaj mortinta filo.....	10
7. Nomi aliulon frato.....	12
8. Pri la ŝtelitaj vestoj.....	14
9. Laŭdo al la patro.....	16
10. Konstruado de trietaĝa domo.....	17
11. Bramano, kiu mortigis sian filon	19
12. Kuri kandon.....	21
13. Koleremo.....	22
14. Mortigi la gvidiston.....	24
15. Rapida kreskigo al la reĝidino.....	26
16. Akvumi sukerkanon.....	28
17. Ŝuldo de duono de monero.....	29
18. Proksimiĝi al akrigilo.....	30

19. Perdo de arĝenta bovlo.....	31
20. Babilado pri la krueleco de la reĝo.....	33
21. Metodo por havi plian filon.....	35
22. Komerco per kalambako.....	36
23. Paki malnovaĵon per silkaĵo.....	37
24. Semi rostitan sezamon.....	38
25. Rakonto pri akvo kaj fajro.....	39
26. Imiti palpebrumadon de la reĝo.....	40
27. Metodo por kuraci vundon.....	42
28. Ŝanĝi la nazon de la edzino.....	43
29. Bruligi la malnovan vestaĵon.....	45
30. Rakonto pri ŝafisto.....	47
31. Dungi metiiston pri argilaĵo.....	49
32. Komercisto ŝtelis oron.....	51
33. Haki arbon por preni frukton.....	52
34. Transporti dolĉan akvon.....	54
35. Spegulo sur trezoro.....	56
36. Elpreni la okulojn de ermito.....	58
37. Mortigi bovojn.....	60

38. Trinki akvon el ligna tubo.....	61
39. Ĥmiri la domon.....	63
40. Sufero pro kalveco.....	65
41. Kverelo inter Du Demonoj.....	67
42. Protekti kamelan felon.....	69
43. Granda ofero por bagatelaĵo.....	71
44. Satiĝo pro duona kuko.....	72
45. Gardi pordon.....	74
46. Ŝteli gruntbovon.....	76
47. Imiti pepadon.....	78
48. besto kaj arbo.....	80
49. Disputo pri la trovitaj haroj.....	81
50. Kuraci ĝibon.....	82
51. Komuna servistino.....	83
52. Muzikisto kaj la reĝo.....	84
53. Reciproka venĝo.....	85
54. La kapo kaj vosto.....	86
55. Lojala Subulo.....	87
56. Postulo al “Nenio”	89

57. Piedbati buŝon de prestiĝulo.....	91
58. Dividi heredaĵon.....	93
59. Rigardi botelfaradon.....	95
60. bildo de Oro.....	97
61. La kreaĵo de brama disĉiplo.....	99
62. Manĝi fazanaĵon por resaniĝo.....	101
63. Teruriĝo pro la rakŝasa kostumo.....	103
64. “Demono” en la malnova domo.....	105
65. Kvincent kneloj.....	107
66. Reciti Stirmetodon.....	112
67. Geedzoj silente manĝas kukon.....	114
68. Sinvenĝo.....	116
69. Rapida Manĝado.....	117
70. Gustumi mangojn.....	119
71. Blindiĝo pro la edzinoj.....	121
72. Buŝo da milio.....	122
73. Mensogo pri morto de la ĉevalo.....	124
74. Eviti punon.....	126
75. Perdo de ambaŭ urno kaj kamelo.....	127

76. Aspiro al Reĝidino.....	129
77. Melki Virazenon.....	131
78. Hastema Filo.....	133
79. Porti Benkojn por la Reĝo.....	135
80. Klistero.....	136
81. Venĝo kontraŭ urso.....	138
82. Semi tritikon.....	139
83. Venĝo de simio.....	141
84. Bati hundojn pro la luna eklipso.....	142
85. Virino kun okula malsano.....	143
86. Protekti orelingojn.....	144
87. Dividi ŝtelaĵon.....	146
88. Simio kaj sojfaboj.....	147
89. Ora putoro.....	148
90. Malriĉulo kaj trovita mono.....	149
91. Revo de malriĉulo.....	151
92. Knabo kaj knelo.....	152
93. Maljunulino kaj urso.....	153
94. Kanalo “Manio”.....	155

95. Rakonto pri gekolomboj.....	157
96. Falsa blindulo.....	159
97. Perdo de vestaĵo kaj ora monero.....	160
98. Mortigo al testudo.....	162
Kvarversoj.....	163
Terminoj.....	165

PREFACO

Jen kiel mi aŭdis. Foje la Budho estis en Monaĥejo Karanda Bambubosko¹ de Raĝagriho² kune kun homamaso el tridek ses mil bikŝuoj, bodisatvoj kaj okspecaj malhomaj protektantoj³ de Budhismo.

En la kunsido ankaŭ estis kvincent bramanoj kaj alireligianoj. Ili stariĝis de sur la sidejoj kaj diris al la Budho: “Ni aŭdis, ke budhismo havas senkompareble profundan scion, do ni venis por peti de vi instruon. Bonvolu instrui nin.”

La Budho respondis: “Bonege!”

Demando: “Ĉu la mondo estas reala aŭ ne?”

Respondo: “Ĝi estas kaj reala kaj ne.”

Demando: “Se la mondo estas reala, kial vi diris ne? Se ĝi estas ne reala, kial vi diris jes?”

Respondo: “Ĝi estas reala nur por la vivantoj kaj nereala por la mortintoj. Do mi povas diri, ke ĝi estas kaj reala kaj ne.”

Demando: “De kie estiĝis homoj?”

Respondo: “Homoj estiĝis de kvin cerealoj⁴.”

Demando: “De kie estiĝis la kvin cerealoj?”

Respondo: “La kvin cerealoj estiĝis el la kvar elementoj⁵, nome: la tero, akvo, fajro kaj vento.”

Demando: “De kie estiĝis la fajro, vento kaj aliaj el la kvar elementoj?”

Respondo: “La fajro, vento kaj la aliaj el la kvar elementoj estiĝis el senenteco.”

Demando: “De kie estiĝis la senenteco?”

Respondo: “El neekzisteco.”

Demando: “De kie estiĝis la neekzisteco?”

Respondo: “El naturo.”

Demando: “De kie estiĝis la naturo?”

Respondo: “El nirvano.”

Demando: “De kie estiĝis la nirvano?”

La Budho demandis: “Kial vi demandas tiel profunde nun? Nirvano estas stato de absoluta liberiĝo el vivo kaj morto.”

Demando: “Ĉu la Budho nirvaniĝis?”

Respondo: “Mi ne nirvaniĝis.”

“Se vi ne nirvaniĝis, kiel vi scias, ke nirvano estas eterna kaj feliĉa?”

La Budho diris: “Respondu, ĉu la vivestaĵoj en la mondo estas feliĉaj aŭ suferaj?”

Respondo: “Ili estas ege suferaj.”

La Budho demandis: “Kiel vi diras, ke la vivestaĵoj estas suferaj?”

Respondo: “Mi vidis, ke vivestaĵoj suferas netolereble kiam ili mortas, do mi scias pri la morta sufero.”

La Budho diris: “Vi ankoraŭ ne mortis, tamen vi bone scias la suferon de morto; Mi vidis, ke budhoj el la dek direktoj nek naskiĝas nek mortas, do mi scias, ke nirvano estas eterna kaj feliĉa.”

Al la kvincent alireligianoj subite aperis kompreno kaj fido. Ili laŭvole akceptis la kvin maksimumojn⁶ de la Budho kaj atingis la staton de sotapano⁷. Post tio, ili residiĝis.

La Budho diris: “Bone aŭskultu! Mi predikos al vi per paraboloj.”

1. MANĜI SALON

Antaŭe malsaĝulo gastis ĉe alia homo. La gastiganto regalis lin per manĝaĵo. Li sentis, ke la manĝaĵo estas sengusta. Aŭdinte tion, la gastiganto ree aldonis iom da salo en la manĝaĵon.

La malsaĝulo trovis, ke la manĝaĵo estas pli bongusta, li do pensis: “La manĝaĵo plibongustiĝis pro la salo. Nur iom da salo povas tiel bongustigi la manĝaĵon, ĉu pli da salo ne farus ĝin des pli bongusta?”

Li ekmanĝis nur salon pro manko de saĝo. Tio damaĝis lian gustosenson kaj suferigis lin.

Aŭdinte, ke oni povas atingi sukceson en sia religia praktikado per abstinado de manĝon, iuj praktikantoj de aliaj religioj sin detenas de manĝo dum sep aŭ dek kvin tagoj, sed ilia ago nur suferigas ilin anstataŭ helpi ilin al sukceso. Ankaŭ ili similas al la malsaĝulo, kiu manĝis nur salon por ĝui bongustecon, sed fine damaĝis sian gustosenson.

2. MELKI BOVINON

Antaŭe estis malsaĝulo. Li volis regali gastojn per festeno, kaj devis kolekti lakton por tio. Li pensis: “Se mi melkos la bovinon ĉiutage, la lakto multiĝos. Mi ne havas sufiĉe da tenujoj por ĝi. Krome, ĝi facile ranciĝos. Estas plibone lasi ĝin en la ventro de la bovino. Mi tuj elprenos ĝin nur ĉe la festeno.

Tiel decidinte, li kaptis la bovinon kaj bovidon, kaj ligis ilin aparte.

Monaton poste, li bonvenigis gastojn kaj komencis prepari la festenon. Kiam li alkondukis la bovinon por melki ĝin, la bovino ne plu donis lakton. La gastoj aŭ koleris aŭ mokridis je li.

Iuj malsaĝuloj kondutas same. Ili volas havigi al si meriton per almozdono, sed diras: “Mi donos grandan almozon nur kiam mi riĉiĝos.” Sed antaŭ la riĉiĝo ili perdas la havaĵon pro la guberniestroj, rabistoj aŭ la fatalaĵoj de akvo kaj incendio, aŭ ili perdas la vivon. Se oni ne faras la almozdonon senprokraste, la rezulto estas simila.

3. VUNDIĜO PRO PIROJ

Iam estis kalva malsaĝulo. Iu senĉese ĵetis pirojn sur lian kapon kaj vundis lin. La malsaĝulo eltenis tion silente anstataŭ forfuĝi.

Vidinte tion, oni diris al li: “Kial vi ne forkuru, sed eltenas la baton ĝis vundiĝo?”

La malsaĝulo respondis: “La batanto havas nur forton anstataŭ saĝon. Vidinte, ke mia kapo estas senhara, li prenis ĝin kiel ŝtonon. Tial li senĉese batis min je la kapo per piroj kaj vundis ĝin.”

Oni diris: “Estas vi, al kiu mankas saĝo. Kial vi ankoraŭ opinias, ke li estas tia? Se vi havas iom da saĝo, kial vi ne forkuris anstataŭ esti senĉese batita ĝis la kapvundiĝo.”

Iuj bikŝuoj estas samaj. Anstataŭ praktiki meditadon, observi disciplinojn kaj lerni budhan instruon, ili atentigas nur pri la ekstera figuro por ĉasi profiton. Ili kondutas simile al la malsaĝulo, kiu ne sciis forfuĝi de bato sed opiniis, ke la batanto estas malsaĝa.

4. VIRINO SIN ŜAJNIGIS MORTA

Iam estis malsaĝulo. Lia edzino estis ĉarma. Li tre amis ŝin, sed ŝi estis nek fidela nek ĉasta. Poste, kiam ŝi kontaktis aliajn homojn, ŝi dronis en volupto kaj volis forlasi la edzon por sin ĵeti en la sinon de la adultulo. Ŝi do ŝtele diris al iu maljunulino: “Trovu virinan kadavron kaj metu ĝin en mian ĉambron post mia foriro. Diru al mia edzo, ke mi jam mortis.”

Post la eliro de la malsaĝulo, la maljunulino trovis virinan kadavron, kaj portis ĝin en lian domon. Kiam la malsaĝulo revenis hejmen, ŝi diris al li: “Via edzino jam mortis.”

La malsaĝulo pririgardis la kadavron kaj vere kredis, ke la kadavro estas la korpo de la edzino. Li do lamentis dolore. Poste, li kremaciis la kadavron per multe da oleo kaj brulligno, metis la cindron en saketon kaj tenis ĝin en la sino tagnokte.

Kiam la malĉastulino enuiĝis pri la adultulo kaj revenis hejmen, ŝi diris al la edzo: “Mi estas via edzino.”

La edzo respondis: “Mia kara edzino jam mortis. Kiu vi estas? Kial vi eĉ kuraĝas ŝajnigi vin kiel mian karan edzinon?” La virino klarigis multfoje, sed neniel sukcesis konvinki la edzon.

Ankaŭ iuj praktikantoj de aliaj religioj kondutas same. Aŭdinte malĝustajn dirojn, ili estas mistifikitaj kaj persiste kredas tion vera. Kvankam ili aŭdas veran instruon poste, ili rifuzas kredi kaj akcepti ĝin.

5. SOIFA MALSAGULO

Iam estis homo, al kiu mankis saĝo. Li soifegis kaj deziris trinki akvon. Vidinte vaporon estiĝantan pro varma vetero, li opiniis, ke ĝi estas akvo. Li do iris al ĝia direkto eĉ ĝis li atingis la Hindian Riveron. Sed, atinginte la riveron, li nur gapis anstataŭ ektrinki.

Oni demandis al li: “Vi serĉis akvon pro soifo, sed kial vi ne ektrinku starante ĉe la akvo?”

La malsaĝulo respondis: “Mi trinkus se mi povus eltrinki la tutan riveron. Sed estas tro da akvo por eltrinki, mi do trinku neniom.”

Aŭdinte tion, ĉiuj eksplodis de ridego.

Simile, iuj praktikantoj de aliaj religioj sin tenas al malĝusta vidpunkto. Ili ne akceptas la budhismajn disciplinojn, opiniante, ke ili ne povas tute observi ilin. Pro tio ili daŭre vivos en la samsaro de la ses vivstatoj kaj havos neniom da ebleco por sin liberigi en la estonteco. Ili similas al la malsaĝulo, kiu rifuzis trinki akvon ĉe la rivero kaj ricevis mokon de aliaj homoj.

6. MALSAĜULO KAJ MORTINTA FILO

Iam antaŭe, malsaĝulo havis sep filojn. Unu el ili mortis. Vidinte tion, la malsaĝulo volis forlasi la domon por cedi ĝin al la mortinto.

Kiam oni informiĝis pri tio, ili diris al li: “Vivantoj kaj mortintoj apartenas al malsamaj mondoj. Vi devas tuj bele vesti kaj enterigi lin en malproksimo. Kial vi restigos lin en la domo dum vi forlasos?”

La malsaĝulo ekpensis: “Se mi devas lin enterigi anstataŭ restigi en la domo, mi mortigos alian filon por ligi lin al alia pinto de la portvektio. Tiel mi portos ilin pli facile.” Li do mortigis alian filon, portis ambaŭ kadavrojn malproksimen kaj enterigis ilin.

Pro tio oni ridis lin, opiniante, ke ili neniam vidis tiel stultan homon.

Bikŝuo faras maldecaĵon kontraŭ disciplino sed ne kuraĝas konfesi, do li kaŝas tion kun aserto, ke li kondutas pure. Saĝuloj diras al li: “Kiel monaĥo vi

devas tiel observi disciplinojn kiel teni perlojn atente por ne perdi ilin. Kial vi kontraŭis disciplinon sed ne pente konfesi vian kulpon?” La kulpinto diras: “Se mi devas konfesi, mi kontraŭu ankaŭ aliajn disciplinojn por konfesi samtempe.” Do li faras aliajn malbonajn kondutojn kontraŭ la disciplinoj kaj poste konfesas la kulpojn samtempe. Li kondutas simile al la malsaĝulo, kiu mortigis alian filon post la morto de unu.

7. NOMI ALIULON FRATO

Antaŭe vivis homo ne nur bela kaj saĝa, sed ankaŭ tre riĉa. Ĉiuj en la mondo laŭdis lin.

Vidinte tion, malsaĝulo prenis lin kiel sian fraton por peti monon laŭ bezono, sed ne plu nomis lin frato kiam li vidis, ke la “frato” repagas ŝuldon.

La aliaj homoj diris al la malsaĝulo: “Kiel malsaĝa vi estas! Kial vi nomis lin frato kiam vi bezonis monon, sed ne plu rigardis lin kiel vian fraton kiam li ŝuldis monon?”

La malsaĝulo respondis: “Mi rigardis lin kiel mian fraton nur por peti de li monon, sed fakte li tute ne estas mia frato. Do kiam li ŝuldis monon, mi ne plu nomis lin frato.”

Neniu povis sin deteni de rido aŭdinte tion.

Tiaj estas iuj kredantoj de la aliaj religioj. Ili aŭdas la instruon de la Budho, kaj prenas ĝin kiel sian propran. Kiam oni proponas, ke ili praktiku la instruon, ili

rifuzas dirante: “Mi instruas homojn per la vortoj de la Budho nur por min profitigi, sed mi tute ne prenas ĝin kiel la veron, do kial mi devas praktiki ĝin?”

Tio similas al la malsaĝulo, kiu rigardis alian homon kiel sian fraton por akiri monon sed diris, ke la homo ne estas lia frato kiam li vidis, ke tiu havas ŝuldon.

8. PRI LA ŜTELITAJ VESTOJ

Iam antaŭe barbara montano ŝtelis aĵojn el trezorejo de la reĝo kaj forkuris malproksimen. La reĝo sendis siajn subulojn al diversaj lokoj por kapti lin. Fine oni trovis lin kaj eskortis lin al la reĝo. La reĝo demandis, de kie li havigis al si la vestojn. Li respondis: “La vestoj apartenis al mia avo.”

La reĝo ordonis, ke li sin vestu per la vestoj. La vestoj ne estis heredaĵoj de la montano, do li tute ne sciis kiel sin vesti per ili konvene. Li surpiedigis tion, kion oni surportas sur la manoj kaj surkapigis tion, kion oni surhavas ĉirkaŭ la talio.

Vidinte tion, la reĝo kunvenigis la korteganojn kaj informis ilin pri la afero. Li diris al la ŝtelisto: “Se la vestoj estus hereditaj de via avo, vi devus scii kiel vin vesti per ili. Kial vi surportis ilin malkonvene kaj surmetis la suprajn vestaĵojn malsupre? Pro via fuŝaĵo ni scias bone, ke la vestoj estas viaj ŝtelaĵoj anstataŭ heredaĵoj.”

Mi prenas la rakonton kiel simbolon. La reĝo simbolas la Budhon kaj la trezoro simbolas la Darmon. La malsaĝa montano simbolas kredantojn de aliaj religioj. Subaŭskultinte la budhan instruon, ili metas ĝin en sian doktrinon kiel la propran scion. Tamen pro la senscieco, ili uzas ĝin mise kaj mistifikas aliajn homojn anstataŭ scii la veran signifon. Ili similas al la montano, kiu ŝtelis valorajn vestojn de la reĝo, sed nek sciis detale pri ili nek povis vestiĝi konvene per ili.

9. LAŬDO AL LA PATRO

Antaŭe iu laŭdis sian patron pri la virto kaj diris: “Mia patro estas bonkora. Li ne malutilas nek ŝtelas. Li estas honesta kaj oferema.”

Aŭdinte tion, malsaĝulo ekpensis pri sia patro kaj diris: “La virto de mia patro estas pli supera ol tiu de la via.”

La aliaj homoj demandis: “Bonvolu diri al mi, kiajn virtojn li havas?”

La malsaĝulo respondis: “Mia patro abstinis de volupto ekde la infaneco, kaj sin tenas pura kontraŭ seksumado.”

Oni refutis: “Se via patro abstinis de volupto, kiel li generis vin?” Ĉiuj ridis pri tio.

Stulta homo en la mondo intencas laŭdi iun, sed kaŭzas malhonoron pro sia senscio pri la fakto. Ili similas al la malsaĝulo, kiu deziris laŭdi la patron, sed rezultigis la malon.

10. KONSTRUADO DE TRIETAĜA DOMO

Antaŭe vivis malsaĝulo riĉa sed senscia. Kiam li vizitis alian riĉulon, li vidis lian trietaĝan domon altan, luksan, vastan kaj helan. Li ekŝatis ĝin kaj pensis: “Mi ne estas malpli riĉa ol li. Kial mi ne konstruigu tiel belan etaĝdomon?”

Li tuj alvenigis ĉarpentiston kaj demandis: “Ĉu vi kapablas konstrui etaĝdomon, kiu estas tiel bela kiel tiu de la alia riĉulo?”

La ĉarpentisto respondis: “Jes, lian etaĝdomon konstruis mi mem.”

La riĉulo ordonis: “Nun konstruu tian etaĝdomon por mi.”

La ĉarpentisto tuj mezuris la sidejon kaj ekkonstruis fundamenton por la etaĝdomo.

Vidinte tion, la riĉulo neniel komprenis la intencon de la ĉarpentisto. Li demandis suspekteme: “Kion vi faras?”

La ĉarpentisto respondis: “Mi konstruas trietaĝan domon.”

La malsaĝulo diris: “Mi ne deziras la malsuprajn du etaĝojn de la domo. Konstruu por mi nur la plej supran.”

La ĉarpentisto respondis: “Tute neeble. Kiel oni povas konstrui la duan etaĝon sen la unua, kaj la trian etaĝon sen malsupraj du etaĝoj?”

La malsaĝulo ripetis: “Mi ne volas malsuprajn du etaĝojn. Vi devas konstrui por mi nur la plej supran etaĝon.”

Aŭdinte tion, oni mokridis lin, dirante: “Kiu povas konstrui la supran etaĝdomon sen la malsupraj!”

Iuj el la kvarspecaj disĉiploj⁸ de la Budho nek praktikas diligente nek estimas la Tri Juvelojn⁹. Ili estas maldiligentaj en strebado al la sankteco, sed ili diras: “Mi ne volas la malsuperajn tri atingojn. Mi nur deziras atingi la arahantecon.” Oni mokas ilin kiel la malsaĝulon.

11. BRAMANO, KIU MORTIGIS SIAN FILON

Iam antaŭe bramano pretendis, ke li estas erudicia, kaj lertas pri astrologio kaj ĉiuj aliaj artoj. Opiniante, ke li estas tiel eminenta, li volis paradi per sia kapablo. Li do iris al alia lando, kaj ploregis dolore tenante sian filon en la sino.

Oni demandis al li: “Pro kio vi ploras?”

La bramano respondis: “Tiu ĉi knabeto mortos en sep tagoj, kaj mi ploras pro mia kordoloro.”

Ili konsolis lin: “La longeco de homa vivo estas malfacile aŭgurebla, kaj oni facile eraras en la kalkulado. Eble li ne mortos en sep tagoj. Kial vi ploras anticipe pro tio?”

La bramano respondis: “Mia aŭguro neniam eraras eĉ se mallumiĝus la suno kaj luno, kaj falus la steloj.”

Sorĉite de la prestiĝo kaj profito, li mortigis la propran filon en la sepa tago por pravigi sian aŭguron.

Informiĝinte pri la morto de la knabo post sep tagoj, oni admiris lian kapablon: “Jen vera ĉiosciulo! Li pravas en la aŭguro.”

Ili kredis kaj estimis lin.

Por akiri famon kaj profiton, iuj el la kvarspecaj disĉiploj de la Budho mensogas, ke ili jam sanktiĝis. Iuj malsaĝuloj eĉ murdas homojn por sin ŝajnigi bonkoraj, sed ili senfine suferos en la estonteco pro tio. Ili similas al la bramano, kiu trompis homojn per mortigo al sia filo.

12. KUIRI KANDON

Iam antaŭe, dum malsaĝulo kristaligis kandon, riĉulo venis al li. La malsaĝulo pensis: “Mi devas regali lin per akvo kun kando.” Do li metis iom da akvo en la poton super la fajro kaj ekventumis la akvon desupre por malvarmigi ĝin.

Oni diris al li: “Kiel vi povus malvarmigi la akvon per senĉesa ventumado se vi ne estingus la fajron!” Ĉiuj homoj mokridis lin.

Anstataŭ malpliigi la fajron de siaj ardaj kleŝoj, iuj praktikantoj de aliaj religioj praktikas asketismon, kuŝas sur dornoj kaj rostas sian korpon per fajro por atingi liberiĝon agrablan kaj pacan. Ili klopodas vane, kaj estas mokitaj de saĝuloj. Ilia sufero daŭras ne nur nun, sed ankaŭ ĝis la nemezurebla estonteco.

13. KOLEREMO

Antaŭe viro babilis kun multaj homoj en la ĉambro. Li laŭdis, ke iu havas bonan virton krom nur du mankoj: koleremo kaj hastemo.

Ĝuste tiam la priparolato preterpasis kaj kaptis la vortojn. Li tuj koleriĝis, sin trudis en la ĉambron, kaptis la parolanton kaj batis lin per ambaŭ manoj.

Oni demandis: “Kial vi batas lin?”

La batanto respondis: “Kiam mi estis kolerema kaj hastema? Sed tiu diraĉis, ke mi ĉiam estas tia. Mi batas lin ĝuste pro tio.”

Oni diris: “Nun vi ja montras viajn koleremon kaj hastemon. Kial vi ankoraŭ neas?”

Se iu koleriĝas kontraŭ aliaj kiam ili diras pri lia manko, oni ridas lin pri lia malsaĝo.

Drinkemuloj en la mondo dronas en drinkado kaj diboĉo. Kiam oni kulpigas ilin pri iliaj eraroj, ili koleriĝas kaj klopodas sin senkulpigi per diversaj pretekstoj,

simile al la malsaĝulo, kiu rifuzis agnoski
sian eraron, sed batis tiun, kiu diris pri tio.

14. MORTIGI LA GVIDISTON

Iam antaŭe, aro da komercistoj deziris iri al la maro kaj bezonis iun por gvidi la vojon. Ili kune serĉis kaj fine trovis gvidiston.

Dunginte la gvidiston, ili kune vojaĝis sub lia gvido. Kiam ili iris en dezerton, ili renkontis templon kaj devis oferi homon al la ĉiela dio por preterpasi.

Ili interkonsiliĝis: “Ni ĉiuj estas parencoj. Kiel ni rajtus mortigi iun el ni? Nur la gvidisto konvenas por esti oferaĵo.” Do ili mortigis la gvidiston kaj oferis lin al la dio.

Fine, ili perdis la vojon post la ofera rito. Neniu sciis kien iri, kaj ĉiuj perdis la vivon pro malsato kaj laceco.

Ĉiuj homoj en la mondo kondukas same. Se ili deziras iri al la maro de la budha darmo por havigi al si trezoron, ili devas diligente fari bonan konduton kiel sian gvidon. Se ili detruas sian bonan konduton, ili mismigras en renaskiĝoj kaj neniam povas trapasi metempsikozon. Ili

suferas eterne en la tri suferaj ekzistecoj¹⁰.
Ili similas al la komercistoj, kiuj deziris iri
al la maro, sed mortigis la gvidiston, perdis
la vojon kaj mortis mizere de malsato kaj
laceco.

15. RAPIDA KRESKIGO AL LA REĜIDINO

Iam al reĝo naskiĝis knabino. La reĝo tuj ordonis sian kuraciston: “Donu al mi medicinaĵon, kiu povas tuj plenkreskigi mian filinon.”

La kuracisto respondis: “Mi donos al vi la raran medicinaĵon por tuj kreskigi ŝin, sed mi ne posedas ĝin en la nuna tempo kaj devas trovi ĝin en alia loko. Bonvolu ne vidi vian filinon antaŭ mia reveno. Mi montros ŝin al vi tuj post kiam ŝi prenos la medicinaĵon.”

La kuracisto iris malproksimen por la medicinaĵo, kaj revenis post dek du jaroj. Li kondukis la reĝidinon al la reĝo post kiam ŝi prenis la medicinaĵon.

La reĝo tre ĝojis vidinte ilin. Li pensis: “Vere bona kuracisto li ja estas! Li donis al mia filino medicinaĵon, kiu vere tuj kreskigis ŝin.” Li do ordonis al siaj subuloj premii la kuraciston per trezoro.

Tiam ĉiuj homoj ridis je la reĝo pri lia malsaĝo. Li ne scipovis kalkuli tempon,

sed atribuis la kreskon de sia filino al la funkcio de la medicinaĵo.

Iuj en la mondo ankaŭ estas samaj. Ili iras al instruisto kaj diras: “Mi volas fariĝi sanktulo. Bonvolu instrui min, por ke mi tuj atingu sukceson.”

Per konvena metodo la instruisto instruas al ili meditado kaj kontempladon pri la dek du ligoj al la ĉeno de ekzisteco¹¹. Post akumulado de diversaj meritoj en sia praktikado ili fariĝis arahantoj. Do ili ege ĝojas pro tio kaj diras: “Kiel feliĉa mi estas! La instruisto donas al ni rapidan metodon por sanktiĝi.”

16. AKVUMI SUKERKANON

Antaŭe du homoj kune plantis sukerkanon. Ili interkonsentis: “Premion ricevos tiu, kiu plantos pli bone, kaj punon ricevos tiu, kiu plantos malpli bone.”

Unu el ili pensis: “Sukerkano estas dolĉa. Se mi premos la dolĉan sukron el sukerkano por akvumi mian plantaĵon, mia sukerkano estos des pli dolĉa ol la lia.”

Li do premis sukron el sukerkano, kaj per ĝi akvumis la plantaĵon por havi pli dolĉan sukerkanon, sed tio kaŭzis malutilon al la plantaĵo, kaj li perdis ĉion.

Ankaŭ iuj en la mondo kondutas same. Ili celas al bonfaro, sed profitante, ke ili havas monon kaj potencon, ili minacas, ekspluatas ordinarajn homojn kaj rabas havaĵojn de ili, kaj disdonas la rabaĵojn en bonfaro. Kvankam ili deziras bonan efikon, tame ilia konduto kaŭzas al ili estontan fatalaĵon. Ili tute similas al la malsaĝulo, kiu elpremis sukron el sukerkano por akvumi la plantaĵon sed perdis ĉion.

17. ŜULDO DE DUONO DE MONERO

Antaŭe estis komercisto. Oni ŝuldis al li duonon de monero kaj ne redonis ĝin dum longa tempo, do li iris por postuli la monon.

Lin baris rivero sur la vojo kaj li devis pagi du monerojn por transpasi per boato. Atinginte la cellokon, li ne trovis la ŝuldanton, kaj denove elspezis du monerojn pro la rivero sur la vojo hejmen.

Li elspezis kvar monerojn pro la ŝuldo de duonmonero, kaj krome suferis de lacega vojaĝo. Li elspezis tro multe por la malgranda sumo, kaj pro tio estis mokita de homoj.

Ankaŭ iuj homoj en la mondo estas samaj. Ili rompis siajn observitajn disciplinojn kaj ignoras la moralon pro iom da privata bono. Ili havas malbonan reputacion en la nuna vivo kaj suferos de malbona konsekvenco en la estonteco.

18. PROKSIMIĜI AL AKRIGILO

Iam antaŭe mizera malriĉulo laboris por la reĝo. Li malgrasiĝis tagon post tago pro longa laboro. La reĝo eksentis kompaton kaj donacis al li mortan kamelon.

Ricevinte la mortan kamelon, la malriĉulo tuj eksenfeligis ĝin. Kiam lia tranĉilo malakriĝis, li devis serĉi ŝtonan akrigilon. Fine li trovis malgrandan akrigilon en la supra etaĝo, akriĝis la tranĉilon kaj malsupreniris por daŭrigi la laboron.

Tiel li supreniris multfoje por reakrigi la tranĉilon, kaj ege laciĝis. Enuiĝinte pri tio, li portis la kamelon sur la supran etaĝon por proksimiĝi al la malgranda akrigilo. Oni mokridis lin pri la stultaĵo.

Iuj malsaĝuloj kontraŭas disciplinojn nur por sin pliprofitigi per trezoro, kiun ili deziras uzi en bonfaro por renaskiĝi en la ĉielo. Ili rikoltas tro malmulte kontraŭ la granda elspezo kvazaŭ ili portus mortan kamelon al supra etaĝo por proksimiĝi al malgranda akrigilo.

19. PERDO DE ARGËNTA BOVLO

Iam antaŭe, iu transpasis maron per ŝipo kaj senatente faligis sian arĝentan bovlon en la akvon. Li pensis: “Mi faru markon sur la akvon kaj portempe forlasu la bovlon. Mi prenos ĝin poste.”

Li atingis Srilankon post veturado de du monatoj. Vidinte riveron, li tuj plonĝis en la akvon por retrovi la perditan bovlon.

Oni demandis lin: “Kion vi faras?”

Li respondis: “Mi serĉas mian perditan bovlon.”

Oni demandis: “Kie vi perdis ĝin?”

Li respondis: “En la loko tuj post mia ekveturo sur la maro.”

Oni demandis: “Kiam vi perdis ĝin?”

Li respondis: “Antaŭ du monatoj.”

Oni demandis: “Vi ja perdis ĝin ie antaŭ du monatoj, sed kial vi serĉas ĝin ĉi tie?”

Li respondis: “Mi faris markon sur la akvon tuj post la perdo de mia bovlo. La akvo ĉi tie estas tute sama kiel la markita

akvo, do mi ekserĉis ĝin.”

Oni diris: “Kvankam la akvo estas sama, tamen vi perdis vian bovlon en alia loko. Kiel vi povos retrovi ĝin ĉi tie?”

Ĉiuj eksplodis de ridego.

Anstataŭ praktiki ĝustan konduton, iuj praktikantoj de aliaj religioj persistas en erara opinio pri la kaŭzo de sufero laŭ ŝajne bona metodo por strebi al la liberiĝo. Ili similas al la malsaĝulo, kiu serĉas ĉi-tie bovlon perditan en alia loko.

20. BABILADO PRI LA KRUELECO DE LA REĜO

Iam iu babilis pri la manko de la reĝo kaj diris: “La reĝo estas tro kruela, kaj li regas la landon tute senracie.”

La reĝo eksplodis de kolero informiĝinte pri tio. Anstataŭ enketi, kiu parolis pri li, li kredis malfidelan homon, kaptis lojalan ministron kaj ordonis, ke oni detranĉu cent taelojn da karno de sur lia dorso.

Poste, oni atestis, ke la punito estas senkulpa kaj miskondamnita. La reĝo ege bedaŭris kaj pretigis mil taelojn da viando por plenigi la vundon de la mispunito.

La mispunito ĝemadis nokte pro la neeltenebla doloro. Aŭdinte tion, la reĝo demandis: “Kial vi ankoraŭ malĝojas? Mi detranĉis de vi cent taelojn da karno, sed jam redonis al vi dekoble. Ĉu vi ankoraŭ ne kontentas pri tio? Kial vi ankoraŭ malĝojas?”

Alia homo respondis: “Se vi detranĉus mian kapon, Via Reĝa Moŝto, mi ne povus

eviti morton eĉ se vi rekompencus min per mil kapoj. Kvankam li ricevis viandon dekoble, li ne povas sin liberigi de la doloro.”

Ankaŭ malsaĝaj homoj kondukas same. Ili diboĉas en la nuna tempo, sed tute ignoras la estontan suferon. Ili faras malutilon al vivestaĵoj kaj ekspluaton al homoj kun intenco havi pli da riĉaĵo. Per la eltrudita mono li volas fari bonon por kompensi sian kulpon kaj havigi al si meriton. Ili similas al la reĝo, kiu vane klopodis sendolorigi la suferanton, de kiu li tranĉis karnon kaj poste al kiu li plenigis la vundon per pli da viando.

21. METODO POR HAVI PLIAN FILON

Iam antaŭe, virino havis filon kaj deziris plian. Ŝi demandis al aliaj virinoj: “Kiu havas metodon por ke mi nasku plian filon?”

Maljunulino diris al ŝi: “Mi povas realigi vian deziron, sed vi devas fari oferon al la ĉiela dio por tio.”

La virino demandis al la maljunulino: “Kion mi devas oferi al la dio?”

La maljunulino respondis: “Se vi mortigos vian filon kaj oferos lian sangon al la dio, vi povos naski plian filon.”

La virino do decidis mortigi sian filon laŭ konsilo.

Saĝulino mokridis kaj insultis ŝin: “Kiel malsaĝa vi estas! Estas ankoraŭ ne certe, ĉu vi povos naski plian filon aŭ ne, tamen vi eĉ pretas mortigi la nunan.”

Ankaŭ malsaĝuloj en la mondo kondukas same. Kun deziro al la estonta feliĉo ili sin ĵetas en fajron kaj turmentas diversmaniere por renaskiĝi en la ĉielo.

22. KOMERCO PER KALAMBAKO¹²

Iam antaŭe, filo de prestiĝulo iris al la maro por kolekti kalambakon. Li havigis al si ĉaron da kalambako post kelkaj jaroj kaj portis ĝin hejmen por vendi en bazaro.

Neniu aĉetis ĝin pro la alta prezo. Neniom li vendis dum multaj tagoj, do li ege ĉagreniĝis pro tio.

Li vidis, ke iu vendas lignokarbon rapide. Li pensis: “Mi preferas bruligi ĝin kaj turni ĝin en lignokarbon por elvendi rapide.”

Li tuj bruligis la kalambakon en lignokarbon kaj vendis ĝin en bazaro kontraŭ enspezo de duonĉaro da lignokarbo.

Ankaŭ malsaĝaj mondanoj kondutas same. Ili laboras diligente per diversaj klopodoj por budhiĝi, sed poste rezignas la klopodon pro la malfacileco, kaj ekdeziras arahantiĝi por atingi nirvanon laŭeble plej frue.

23. PAKI MALNOVAĴON PER SILKAĴO

Iam ŝtelisto glitis en la domon de riĉulo kaj ŝtelis silkaĵon. Li pakis malnovajn vestaĵojn kaj aliajn havaĵojn per la ŝtelita silkaĵo. Saĝuloj mokridis lin pro tio.

Ankaŭ iuj malsaĝaj homoj en la mondo estas similaj. Ili kredas je Budhismo kun intenco praktiki bonon kaj akumuli meriton, tamen pro avido ili kontrŭis siajn purajn disciplinojn kaj perdis ĉiujn meritojn. Pro tio ili estas same mokitaj de aliaj homoj.

24. SEMI ROSTITAN SEZAMON

Antaŭe malsaĝulo gustumis sezamojn, kaj opiniis, ke ili ne gustas bone. Poste li rostis ilin kaj trovis ilin multe pli bongustaj. Li do pensis: “Mi rostos la semojn antaŭ la semado. Tiel mi povos rikolti bongustajn sezamojn poste.”

Li do rostis kaj semis sezamojn, sed la semoj neniam ĝermis.

Iuj en la mondo kondutas same. Ili ne ŝatas la bodisatvan praktikadon longan kaj malfacilan, do ili pensis: “Estas pli bone fariĝi arahanto por liberiĝi el la metempsikozo pli facile kaj rapide.” Poste ili denove deziras atingi budhecon, sed neniel povas sukcesi. La rostitaj semoj ne povas ĝermi, kaj ankaŭ la malsaĝuloj en la mondo estas samaj.

25. RAKONTO PRI AKVO KAJ FAJRO

Antaŭe iu bezonis fajron kaj malvarman akvon. Li estigis fajron kaj metis pelvon da malvarma akvo supre.

Poste, kiam li bezonis fajron, la fajro jam estingiĝis, kaj kiam li prenis malvarman akvon, la akvo jam varmiĝis. Li perdis ambaŭ fajron kaj malvarman akvon.

Iuj homoj en la mondo estas samaj. Ili iras al Budhismo kaj monaĥiĝas por la praktikado, sed ankoraŭ sopiras al la edzino, gefiloj, parencoj, mondaĵoj kaj diboĉoj. Pro tio ili perdas la fajron de merito kaj akvon de disciplinoj. Ankaŭ aviduloj kondutas same.

26. IMITI PALPEBRUMADON DE LA REĜO

Iam antaŭe iu volis flati la reĝon kaj demandis la aliajn: “Kiel mi povas akiri plaĉon al la reĝo?”

Oni respondis: “Se vi volas plaĉi al la reĝo, vi devas imiti lian aspekton.”

Li do iris al la reĝo. Vidinte la palpebrumadon de la reĝo, li imitis lin. La reĝo demandis lin: “Ĉu vi suferas je malvarmumiĝo aŭ okula malsano? Kial vi palpebrumas?”

Li respondis: “Mi suferas nek je okula malsano nek je malvarmumiĝo. Vidinte, ke vi palpebrumas, ankaŭ mi tion faris imite.”

Aŭdinte tion, la reĝo furioziĝis kaj tuj ordonis, ke oni serioze punu kaj forpelu lin el la lando.

Ankaŭ iuj homoj en la mondo estas samaj. Ili volas proksimiĝi al la Budho por ties instruoj kaj scio, sed ĉe la Budho ili ne komprenas, ke li montris iom da manko laŭkondiĉe por profitigi la vivestaĵojn. Ili aŭ moka lin pri la neperfektaj vortoj aŭ

imitas la mankojn kiam ili aŭskultas la instruon. Pro tio ili perdas la profiton en praktikado de Budhismo kaj renaskiĝas en la tri malbonaj vivstatoj. Ili kondutas same kiel la malsaĝulo.

27. METODO POR KURACI VUNDON

Antaŭe iu estis skurĝita de la reĝo. Poste, li ŝmiris sian vundon per ĉevala fekaĵo por resaniĝi pli rapide.

Malsaĝulo vidis tion kaj ekĝojis. Li diris al si mem: “Mi lernis bonan metodon por kuraci vundon.”

Reveninte hejmen, li tuj diris al sia filo: “Skurĝu min je la dorso. Mi havas bonan metodon por kuraci vundon kaj volas provi ĝin.”

La filo skurĝis lin je la dorso, kaj li ŝmiris la vundon per ĉevala fekaĵo, preninte tion kiel bonan metodon.

Ankaŭ iuj homoj en la mondo estas samaj. Aŭdinte, ke iuj praktikis kontempladon pri la malpureco kaj liberiĝis el la damaĝo de kvin agregaĵoj¹³, ili diras: “Mi volas kontempli virinon kaj la kvin pasiojn.” Anstataŭ vidi la malpurecon de pasioj, ili estas sorĉitaj de volupto, renaskiĝas en la metempsikozo kaj falas en la inferon.

Malsaĝuloj en la mondo kondukas same.

28. ŜANĜI LA NAZON DE LA EDZINO

Antaŭe iu havis edzinon, kiu estis ĉarma krom la malbela nazo.

Irante ekster la domo, la edzo vidis ĉarman virinon kun bela nazo. Li tuj pensis: “Mi detranĉos ŝian nazon kaj metos ĝin sur la vizaĝon de mia edzino. Ĉu tio ne estos pli bona?”

Li do detranĉis la nazon de la virino kaj portis ĝin hejmen. Atinginte hejmen, li tuj vokis sian edzinon: “Eliru! Mi donos al vi belan nazon!”

Je la eliro de la edzino, li detranĉis ŝian nazon kaj metis la alian sur ŝian vizaĝon. La nazo neniel povis sidi bonorde, do la edzino perdis la nazon kaj vane suferis grandan doloron.

Ankaŭ malsaĝuloj en la mondo estas samaj. Aŭdinte, ke konataj ŝramanoj kaj bramanoj havas prestiĝon kaj ricevas estimon kaj oferon de aliaj homoj, ili pensas: “Mi estas tute sama kiel ili.” Do ili mensogas, ke ili havas virton. Ili perdas

profiton kaj detruas sian virton. Ili similas al tiu, kiu detranĉis nazon de alia virino kaj vundis sian edzinon.

29. BRULIGI LA MALNOVAN VESTAĴON

Iam antaŭe iu vivis mizere en malriĉeco. Li laboris por alia homo, gajnis maldelikatan vestaĵon kaj sin vestis per ĝi.

Iu vidis tion kaj diris al li: “Naskiĝinte el alta klaso, vi estas filo de nobelo. Kiel vi povas surhavi tiel maldelikatan vestaĵon? Mi instruos al vi metodon akiri la plej bonan vestaĵon. Faru laŭ mia instruo! Mi tute ne trompos vin.”

La malriĉulo ĝojegis kaj obeis al li.

La viro bruligis fajron antaŭ la malriĉulo kaj ordonis: “Nun demetu vian malbonan vestaĵon kaj metu ĝin en la fajron. Poste vi trovos la plej bonan vestaĵon el la fajro.”

La malriĉulo tuj demetis sian vestaĵon kaj metis ĝin en la fajron.

Poste, li serĉadis la novan vestaĵon en la fajro, sed trovis nenion.

Ankaŭ mondanoj kondutas same. Ili renaskiĝas en la homa mondo pro sia bona konduto en la pasintaj vivoj, do ili devas

bone protekti la homan vivon por praktiki bonan konduton kaj havi al si meritojn. Sed ili estas trompitaj de aliaj religioj kaj malicaj demoninoj: “Vi devas kredi min. Praktiku asketismon kaj ĵetu vin en fajron aŭ valon. Post via morto, vi renaskiĝos en la paradizo kaj ĝuos eternan feliĉon.” Aŭdinte tion, ili rezignas sian vivon. Ili naskiĝas en la infero kaj suferas mizere post la morto. Ili perdas la homan vivon, sed akiras nenian feliĉon, same kiel la malriĉulo.

30. RAKONTO PRI ŜAFISTO

Iam iu lertis en paŝtado kaj havis milojn da ŝafoj. Sed li estis tre avara kaj neniam volis elspezi monon.

Tiam vivis homo lerta je trompado. Li klopodis amikiĝi kun la ŝafisto kaj diris al li: “Nun ni jam intimiĝis kiel unu, kaj ne plu estas diferenco inter ni. Mi scias, ke iu havas belan filinon. Mi volas svati ŝin por vi.”

Aŭdinte tion, la ŝafisto ĝojegis kaj donacis multe da ŝafoj kaj havaĵo al la trompisto.

La trompisto denove diris: “Hodiaŭ via edzino naskis filon al vi.”

La ŝafisto ankoraŭ ne vidis la knabinon, tamen li ĝojegis kaj prezentis grandan donacon al la trompisto, aŭdinte pri ŝia akuŝo.

Poste, la trompisto reiris al la ŝafisto kaj diris al li: “Via filo mortis post sia naskiĝo.”

Kiam la ŝafisto aŭdis tion, li tuj lamentis pro malĝojo.

Ankaŭ mondanoj kondutas same. Ili lernas multe da scio, sed ne volas instrui al aliaj pro avido al famo kaj profito. Mistifikite de la efemera korpo, ili avidas la mondajn feliĉojn, kiaj la edzino kaj gefiloj. Pro la trompiĝo ili perdas bonan konduton, vivon kaj havaĵon, kaj fine ploras pro la granda sufero, simile al la ŝafisto.

31. DUNGI METIISTON PRI ARGILAĴO

Iam bramana pastro volis okazigi religian riton kaj diris al sia disĉiplo: “Mi bezonas argilaĵojn por la rito. Dungu por mi argilaĵan metiiston en la foiro!”

La disĉiplo iris al la hejmo de metiisto. Tiam la metiisto portis argilaĵojn al foiro per sia azeno por vendi ilin, sed la azeno rompis ĉion dum momento. Li revenis hejmen kaj ploris kordolore.

Kiam la disĉiplo vidis tion, li demandis: “Kial vi tiel ĉagreniĝis?”

La metiisto respondis: “Mi diligente produktis argilaĵojn dum longaj jaroj. Kiam mi portis ilin al foiro por vendi, la damninda azeno detruis ĉion dum momento. Mi ege ĉagreniĝis pro tio.”

Aŭdinte tion, la disĉiplo ekĝojis. Li diris: “Kiel eksterordinara estas via azeno! Ĝi eĉ povas momente detrui ĉion, kion vi elfaris dum longaj jaroj. Mi aĉetos ĝin de vi!”

La metiisto plezuriĝis kaj tuj vendis la azenon.

Post kiam la disĉiplo revenis tirante la azenon, la bramano demandis: “Por kio vi alkondukis azenon anstataŭ la metiiston?”

La disĉiplo respondis: “Tiu ĉi azeno estas pli kapabla ol la metiisto. Ĝi povas tuj detrui la argilaĵojn, kiujn la metiisto elfaris dum longaj jaroj.”

La bramano diris: “Kiel malsaĝa vi estas! La azeno povas rompi argilaĵojn, tamen ĝi ne kapablas fari eĉ unu argilaĵon dum cent jaroj!”

Ankaŭ homoj en la mondo estas samaj. Kvankam ili ricevas oferojn de aliaj por longa tempo, tamen ili neniam faras rekompenco. Ili nur faras malutilon anstataŭ helpon. La maldankemaj homoj ofte tiel kondutas.

32. KOMERCISTO ŜTELIS ORON

Iam du komercistoj kune faris sian propran negocon. Unu vendis oron, dum la alia vendis kapokaĵon.

Aĉetanto de oro bruligis oran ingoton de komercisto por taksi ĝian verecon. La alia komercisto ŝtelis la bruligitan oron kaj kaŝis ĝin en sian kapokaĵon.

La kapokaĵon tute cindriĝis pro la ardo de la oro. Lia ŝtelado malkaŝiĝis kaj li perdis ankaŭ kapokaĵon.

Iuj alireligianoj same plagiatas instruon de Budhismo kaj aldonas ĝin en sian doktrinion kun mensogo, ke ĝi estas la doktrino de ili anstataŭ de la budhismo. Tamen tio detruas ilian doktrinion kaj malkaŝas ilian ŝteladon. La afero similas al la ŝtelado de oro.

33. HAKI ARBON POR PRENI FRUKTON

Iam reĝo havis arbon altan kaj grandan. La arbo ĉiam produktis fruktojn dolĉajn kaj bongustajn.

Foje iu gastis ĉe la reĝo. La reĝo demandis: “La arbo donos bongustajn fruktojn. Ĉu vi volas manĝi?”

La gasto respondis: “La arbo estas alta kaj granda. Kiel mi povos preni la fruktojn eĉ se mi volas manĝi?”

La reĝo tuj dehakis la arbon por preni la fruktojn pli facile, sed li akiris nenion post la vana laboro. Poste, kiam li volis restarigi la arbon, ĝi jam sekiĝis kaj ne plu povis reviviĝi.

Ankaŭ mondanoj kondutas same. La Tatagato¹⁴ havas disciplinan arbon, kiu produktas sanktan frukton. Se iuj volas akiri la frukton, tiuj devas observi la disciplinojn kaj akumuli meritojn. Sed pro tio, ke ili ne scias la bonon de la disciplinoj, ili rompas ilin kvazaŭ ili dehakas la frukt-donan arbon. Ili rikoltas

nenion same kiel la dehakinto de fruktarbo.
La homoj detruintaj disciplinojn klopodas
same vane.

34. TRANSPORTI DOLĈAN AKVON

Iam iu vilaĝo estis malproksima de la ĉefurbo je kvin joĝanoj¹⁵. En la vilaĝo troviĝis dolĉa akvo, do la reĝo ordonis, ke la vilaĝanoj sendu dolĉan akvon al li ĉiutage. La vilaĝanoj elĉerpiĝis de tio kaj ĉiuj volis forlasi la vilaĝon por fuĝi malproksimen.

Tiam la vilaĝestro diris al la vilaĝanoj: “Ne forlasu la vilaĝon! Mi petos la reĝon, ke li ŝanĝu la distancon de kvin joĝanoj al tri por proksimigi vin, tiel vi ne plu laciĝos de la vojirado.”

Li faris raporton al la reĝo, kaj la reĝo vere ŝanĝis la distancon al tri joĝanoj.

Ĉiuj ĝojegis pri tio.

Iu diris: “La vojo restas ankoraŭ longa je kvin joĝanoj, kaj la distanco tute ne ŝanĝiĝis.”

Tamen aŭdinte tion, neniu volis forlasi la vilaĝon pro la kredo al la reĝo.

Ankaŭ iuj homoj en la mondo tiel kondutas. Ili praktikas ĝustan darmon de Budhismo por atingi la urbon de nirvano

liberiĝinte el la ekzistecoj de ĉielanoj, homoj, bestoj, malsataj spiritoj kaj inferanoj, sed poste enuiĝas en la klopodo, volas rezigni la antaŭan praktikadon kaj tuj atingi la liberiĝon el la metempsikozo. Tiel ili ne plu paŝos antaŭen. La Budho do interpretis la metodon fariĝi budho per la tri ŝtupoj de sravako¹⁶ (sravaka), pratjekabudho¹⁷ (pratyekabuddha) kaj bodisatvo. La praktikantoj de Teravado ĝojas pro tio, prenante ĝin facila aliro, kaj ili tiel provas akumuli bonfarojn kaj meritojn por atingi liberiĝon el la metempsikozo de naskiĝo kaj morto. Poste kiam ili aŭdas, ke la tri aliroj al Budheco estas fakte unu, ili ne plu volas forlasi sian miskredon, simile al la vilaĝanoj.

35. SPEGULO SUR TREZORO

Iam vivis malriĉulo. Li ŝuldis grandan sumon al aliaj kaj ne kapablis redoni ĝin, do li povis fari nenion alian ol forfuĝi.

En dezerta loko li trovis skatolon plenan de trezoro. Sub la skatola kovrilo kuŝis spegulo sur la valorajo.

Vidinte la skatolon, la malriĉulo ege plezuriĝis kaj tuj malfermis ĝin. Sed kiam li vidis homfiguron en la spegulo, li sentis teruron kaj diris kun ĉebruste alpremitaj manoj: “Mi opiniis, ke la skatolo estas malplena, sed tute ne sciis, ke vi estas ene. Bonvolu ne koleri kontraŭ mi!”

Ankaŭ ordinaraj homoj estas similaj al li. Turmentite de sennombraj ĉagrenoj kaj persekutite de morto, Marao kaj ŝuldataj, ili volas fuĝi el la vivesteco de naskiĝo kaj morto, kaj iras al Budhismo pro tio. Ili praktikas bonan konduton kaj akumulas meriton ĝis ili vidas la skatolon de trezoro. Sed ili konfuziĝas pro la spegulo de egoo, misprenas la vidpunkton pri egoo

kiel veron kaj kroĉiĝas al ĝi. Pro tio ili degeneras kaj tute perdas ĉiujn atingojn de meritoj, meditado, antaŭkondiĉoj por iluminiĝo, senpasia bono kaj sanktaj fruktoj de tri budhismaj skoloj ŝravaka, pratjekabudha kaj bodisatva. Simile al la malsaĝulo, kiu forĵetis la skatolon de trezoro, ankaŭ la homoj kroĉiĝintaj al egoo kondukas same.

36. ELPRENI LA OKULOJN DE ERMITO

Iam ermito sin kulturis en montaro kaj sukcese akiris kvin magiajn povojn. Li povis vidi ĉiujn kaŝitajn trezorojn ene de la tero per la magiaj okuloj.

Informiĝinte pri tio, la reĝo tre ĝojis kaj diris al siaj ministroj: “Kiel ni povos reteni la ermiton, por ke li ĉiam restu en nia lando sed ne iru aliloken? Tiel li povos helpi min trovi pli da trezoro.”

Malsaĝa ministro tuj iris al la ermito, elprenis liajn okulojn kaj portis ilin al la reĝo. Li diris: “Mi jam elprenis la okulojn de la ermito, kaj nun li ne plu kapablas iri aliloken, sed ĉiam restos en nia lando.”

La reĝo respondis: “Mi deziris restigi la ermiton nur pro lia povo vidi kaŝitajn trezorojn ene de la tero. Vi jam detruis liajn okulojn, do per kio li ankoraŭ utilas al mi?”

Ankaŭ mondanoj kondukas same. Vidinte, ke ermito praktikas la kvar penadojn¹⁸ kaj kontempladon pri la

korpa malpureco ĉe tombejo sub la arbo en sovaĝa arbaro, ili perforte kondukas lin hejmen por vivteni lin per diversaj manieroj. Tio detruas lian puran praktikadon, malhelpas lian klopodon al la sukceso kaj perdigis lian prudenton. Ili donas malutilon al la ermito kaj ankaŭ ne povas sin profitigi per tio. Do ili klopodas vane, tute simile al la malsaĝa ministro, kiu detruis la okulojn de la ermito.

37. MORTIGI BOVOJN

Iam iu havis ducent kvindek bovojn. Li ĉiam kondukis ilin al akvo kaj herbejo por paŝti.

Foje, unu bovo estis manĝita de tigro.

La bovisto pensis: “Mi perdis unu bovon, kaj ne plu sufiĉas la antaŭa kvanto de la bovaro. Por kio mi ankoraŭ retenas la restajn?” Li do pelis la aliajn bovojn al alta monto super profunda valo, puŝis ilin suben kaj mortigis ĉiujn.

Ankaŭ malsaĝaj homoj tiel kondutas. Post kiam ili promesis observi budhismajn disciplinojn, ili kontraŭis unu, sed anstataŭ bedaŭri kaj penti, ili pensis: “Mi jam rompis disciplinon, kaj ne plu perfektas en mia pureco. Por kio mi ankoraŭ observas la aliajn?” Ili senescepte rompis ĉiujn aliajn disciplinojn simile al la malsaĝulo, kiu mortigis ĉiujn restajn bovojn.

38. TRINKI AKVON EL LIGNA TUBO

Iam antaŭe iu suferis de laceco kaj soifo dum vojaĝo. Vidinte klaran akvon fluanta el ligna tubo, li tuj aliris trinki.

Post kiam li trinkis ĝiskontente, li levis la manon kaj diris al la ligna tubo: “Ne plu venu! Mi jam trinkis sufiĉe.”

Kiam li vidis, ke la akvo daŭre fluas spite lian ordonon, li furioziĝis: “Mi jam finis la trinkadon kaj ordonis, ke vi ne plu alvenu, sed kial vi ankoraŭ venas?”

Iu vidis tion kaj diris: “Kiel malsaĝa vi estas! Kial vi ne foriras, sed ordonas la akvon halti?” Dirinte, li tiris la malsaĝulon al alia loko.

Ankaŭ mondanoj kondutas same. Ili trinkas amaran akvon de pasioj el kvin sensobjektoj por mildigi la soifon al renaskiĝo kaj morto. Enuite pri tio kvazaŭ ili kontentiĝus de la trinkado, ili diras: “Ĉiuj eksteraj sensobjektoj ne plu aperu antaŭ mi.” Sed la pasioj aperas senĉese. Vidinte tion, ili ekkolas: “Mi jam ordonis, ke vi

foriru kaj ne plu alvenu, kial vi ankoraŭ venas kaj montras vin?”

Tiam saĝulo diras al ili: “Se vi volas atingi liberecon, vi devas deteni viajn ses emociojn estiĝintaj de ses sensorganoj, teni vian menson for de la senso por deteni la iluziojn kaj atingi liberiĝon. Kial vi deziras, ke ili ne aperu, por ke vi ne plu vidu ilin?” Ili similas al la malsaĝulo, kiu trinkis akvon el ligna tubo.

39. ŜMIRI LA DOMON

Iam antaŭe, malsaĝulo vizitis alian homon kaj vidis, ke lia domo estas bela kaj pura kun bone ŝmiritaj muroj kaj glata planko. Li demandis: “Per kio vi ŝmiris viajn murojn kaj plankon tiel bone?”

La gastiganto respondis: “Unue mi infuzis la rizbranojn ĝisplene kaj miksis ilin en ŝlimon. Poste mi ŝmiris la murojn per la ŝlimo, do ili estas tiel glataj.”

La malsaĝulo pensis: “Estas malpli bone nur uzi rizbranojn ol rizgrajnojn por fari la murojn pli glataj kaj blankaj.”

Li miksis rizgrajnojn en ŝlimon por ŝmiri la murojn. Li deziris la murojn pliglatajn, sed ili fariĝis des pli malglataj kaj eĉ fendiĝis. Li vane malŝparis la rizgrajnojn anstataŭ ricevi la deziritan efikon. Estus multe pli bone donaci la rizgrajnojn al malriĉuloj por akumuli meriton.

Ankaŭ ordinaraj homoj kondukas same. Aŭdinte de sanktuloj, ke per diversaj bonfaroj oni povas renaskiĝi en la ĉielo

kaj eĉ atingi liberecon post la morto, ili memmortigas kun espero renaskiĝi en la ĉielo por atingi liberecon. Simile al la malsaĝulo, ili vane perdas sian vivon kaj akiras nenion.

40. SUFERO PRO KALVECO

Iam vivis kalvulo. Li suferis ne nur vintran malvarmon kaj someran varmon, sed ankaŭ pikadon de moskitoj kaj tabanoj. Li turmentiĝis tagnokte kaj ege ĉagreniĝis pro tio.

Venis kuracisto lerta pri diversaj kuracartoj. La kalvulo iris al li kaj diris: “Mi petas, ke vi resanigu min de la kalveco.”

La kuracisto ankaŭ estis kalva. Li demetis sian ĉapon, montris la kapon kaj respondis: “Ankaŭ mi ege suferas pro la kalveco. Se mi povus kuraci kalvecon, mi nepre kuracus min unue por forigi la suferon.”

Ankaŭ mondanoj tiel kondutas. Turmentite de la sufero el la naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto, ili volas trovi metodon por atingi senmortecon. Informiĝinte pri la bonaj kuracistoj kiaj ŝramanoj, bramanoj kaj aliaj en la mondo, ili iras al ili kaj diras: “Bonvolu forigi nian suferon de la efemeraj renaskiĝo

kaj morto, por ke ni ĉiam vivu en feliĉo kaj eterneco.” Tiam la bramanoj kaj aliaj respondas: “Ankaŭ mi suferas de la efemeraj renaskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto, kaj same strebas por la eterneco, sed ankoraŭ ne sukcesas. Se mi trovas rimedon, mi devus ĝin apliki al mi unue kaj ankaŭ doni al vi poste.” Ili same suferas kiel la kalvulo sed ne povas sin kuraci.

41. KVERELO INTER DU DEMONOJ

Iam antaŭe, du demonoj Piŝaĉo²¹ kune posedis skatolon, bastonon kaj paron da sandaloj. Foje ili reciproke konfliktis por havigi al si ĉiujn posedaĵojn kaj senĉese kverelis tutan tagon.

Tiam homo venis al ili. Vidinte tion, li demandis: “Kiajn mirindecojn havas la skatolo, bastono kaj sandaloj, pri kiuj vi kverelas tiel furioze?”

La demonoj respondis: “Mia skatolo povas estigi ĉiajn vestaĵojn, manĝaĵojn, matracojn, litaĵojn kaj aliajn vivbezonaĵojn; per la bastono mi povas tiel subigi ĉiujn malamikojn, ke ili ne plu kuraĝas kontraŭstari al mi, kaj per la sandaloj mi povas flugi libere en la aero.”

Aŭdinte tion, la viro diris al la demonoj: “Tenu vin iom malproksime de mi. Mi juste dividos ilin por vi.”

La demonoj konsentis kaj sin tenis malproksimaj de li. Li mem prenis ambaŭ skatolon kaj bastonon, kaj flugis en la

aeron per la sandaloj.

La demonoj stuporiĝis pro tio, sed povis fari nenion por repreni ilin.

La homo diris al ili: “Nun mi posedas ĉion, pri kio vi kverelis senĉese, por ke vi ne plu kverelu ekde nun.”

Piŝaĉoj estas metaforo de diversaj demonoj kaj aliaj religioj. La skatolo estas metaforo de almozdono kaj el ĝi venas vivbezonaĵoj por kvinspecaj vivestaĵoj, kiuj estas ĉielanoj, homoj, bestoj, malsataj spiritoj kaj inferanoj. Bastono estas metaforo de meditado, per kiu oni povas subigi demonojn de rankoro kaj damaĝon de kleŝo. La sandaloj estas metaforo de disciplinoj, per kiuj oni povas renaskiĝi en la mondoj de ĉielanoj kaj homoj. La kverelado farita de la demonoj kaj aliaj religioj por postuli la skatolon estas metaforo de ilia senfrukta klopodo por la frukto de sia pasio. Oni povas liberiĝi el la sufero kaj atingi liberiĝon nur per praktikadoj de bonkonduito, almozdono, discipliniteco kaj meditado.

42. PROTEKTI KAMELAN FELON

Dum komercistoj faris komercan vojaĝon, unu el iliaj kameloj subite mortis sur la vojo. La mortinta kamelo iam portis multajn trezoron, valoran teksaĵon kaj aliajn objektojn. Oni tuj senfeligis ĝin post ĝia morto.

Antaŭ la forlaso de la komercistoj la ĉefo restigis du lernantojn kaj ordonis: “Bone gardu la kamelan felon kontraŭ putrado pro malsekeco.”

Ekpluvis post nelonge. La malsaĝaj lernantoj kovris la felon per valora teksaĵo por protekti ĝin kontraŭ malsekiĝo, sed la teksaĵo tute detruigis pro tio.

La prezo de la teksaĵo estis multe pli alta ol tiu de la felo. Ili protektis la felon per valora teksaĵo pro malsaĝo.

Ankaŭ ordinaraj homoj en la mondo kondutas tiamaniere. La teksaĵo estas komparo al abstinado de mortigo; la kamela felo estas komparo al komercaĵo; la putrado pro la pluvo estas komparo al diboĉo kaj detruigo de bona konduto.

La disciplino abstini de mortigo estas la darma korpo de la Budho kaj kaŭzo por plej supera atingo, sed anstataŭ praktiki ĝin, ordinaraj homoj preferas almozon al la monaĥoj kaj konstruadon de pagodoj kaj monaĥejoj per mono kaj havaĵo. Per tio ili strebas por la monda feliĉo anstataŭ por la plej grava afero, kaj ne povas liberiĝi de renaskiĝo en la kvin statoj de ĉielano, homo, besto, malsata spirito kaj inferano.

Do religianoj devas rigore sin deteni de mortigo.

43. GRANDA OFERO POR BAGATELAĴO

Iu pene frotadis grandan ŝtonon dum longaj monatoj, kaj finfine faris el ĝi malgrandan bovforman ludilon. Li elspezis tro multe da energio por bagatelaĵo.

Ankaŭ homoj en la mondo kondutas same. Frotado de granda ŝtono estas komparo al diligenta lernado de monda scio. La farado de malgranda bovforma ludilo estas komparo al konkurenco por famo. La kleruloj devas ne nur diligente pristudi diversajn sciojn, sed ankaŭ atente praktiki ilin por atingi superan frukton. Se ili klopodas nur por famo kaj profito, ili dronas en fiereco kaj aroganteco, kaj pliigas siajn malbonon kaj maltrankvilecon.

44. SATIĜO PRO DUONA KUKO

Iam antaŭe, iu malsatiĝis kaj elprenis sep kukojn por manĝi. Li satiĝis nur manĝinte ses kaj duonan kukojn.

Li ege bedaŭris kaj sin batis per manoj. Li sin riproĉis: “Mi satiĝis nur pro tiu ĉi duona kuko. Do la antaŭajn ses kukojn mi manĝis vane. Se mi scius, ke la duona kuko satigos min, mi devus manĝi ĝin unue.”

Ankaŭ homoj en la mondo tiel kondutas. Mankas eterna feliĉo en la homa vivo ekde la komenco, sed oni iluziiĝas pri feliĉo kaj klopodas por akiri ĝin pro malsaĝo. Pro senscienco oni prenas riĉaĵon kaj rangon kiel feliĉo, tute simile al la malsaĝulo, kiu opiniis, ke la duona kuko satigis lin. Ili suferas multe kiam ili klopodas por gajni riĉaĵon, suferas en peno por protekti la gajnita riĉaĵo kaj rangon, kaj, poste, kiam ili perdis la riĉaĵon kaj rangon, ili denove turmentiĝas en bedaŭro kaj sopiro pri la perditaĵoj. Ili ne povas ĝui feliĉon en la tuta tago. Ekzemple, se oni

havas vestaĵon kaj manĝaĵon, ili sin opinias feliĉaj, sed ili suferas en la klopodo por la feliĉo. Budhoj diras, ke malkomfortaj estas la tri mondoj de deziro, de formo kaj de senformo respektive en la metempsikozo, kaj ĉio estas suferiga en ili, sed ordinaraj homoj sin opinias feliĉaj pro sia iluzio.”

45. GARDI PORDON

Iam antaŭe, iu volis vojaĝi malproksimen, li do ordonis al la servisto: “Bone gardu la pordon, azenon kaj ŝnuron.”

Post kiam la mastro foriris, muzikisto ludis muzikon ĉe la najbaro. La servisto volegis aŭskulti muzikon kaj neniel povis sin deteni de la deziro. Li do ŝnuris la pordon al la azeno kaj kondukis la beston al la ludejo por aŭskulti la ludadon.

Ŝtelisto priŝtelis la domon kaj forprenis ĉiujn havaĵojn dum foresto de la servisto.

Reveninte hejmen, la mastro demandis la serviston: “Kie estas la trezoro?”

La servisto respondis: “Via moŝto nur ordonis al mi gardi la pordon, azenon kaj ŝnuron. Mi scias nenion plian krom tio.”

La mastro kulpigis lin: “Mi ordonis vin gardi la pordon nur por protekti la havaĵon. Nun la havaĵo jam tute perdiĝis, do por kio mi ankoraŭ bezonas la pordon?”

La malsaĝuloj en la vivesteco de naskiĝo kaj morto ankaŭ estas la servistoj

de siaj pasioj. La Budho ofte instruis, ke oni devas atenti la pordojn de la ses sensorganoj, observi disciplinojn por sin deteni de la ses sensobjektoj kaj gardi la azenon de senscieco kaj ŝnuron de pasioj. Sed iuj bikŝuoj ne kondutas laŭ la instruo de la Budho. Ili avidas la profiton, mensogas pri sia pureco, sin ŝajnigas mediti en kvieta loko, sed distriĝas pro avido al la kvin pasioj, konfuziĝas pro vidaĵo, sono, odoro kaj gusto, blindiĝas pro senscieco, ligiĝas al pasia ŝnuro kaj perdas ĉiujn trezorojn, kiuj estas ĝustaj atentemo, pripensado, praktikado kaj luminiĝo.

46. ŜTELI GRUNTBOVON

Iam antaŭe, vilaĝanoj kune ŝtelis gruntbovon kaj formanĝis ĝin.

La perdinto de la bovo sekvis ilin en la vilaĝon laŭ la piedsignoj. Li venigis la vilaĝanojn, priskribis la bovon kaj demandis: “Ĉu vi loĝas en la vilaĝo?” La vilaĝanoj respondis: “Ni ne havas vilaĝon.”

Li demandis: “Ĉu en la vilaĝo troviĝas lageto, ĉe kiu vi manĝis la bovon?”

La vilaĝanoj respondis: “Troviĝas neniu lageto en la vilaĝo.”

Li demandis: “Ĉu troviĝas arboj ĉe la lageto?”

La vilaĝanoj respondis: “Troviĝas neniu arbo ĉe la lageto.”

Li demandis: “Ĉu vi ŝtelis la bovon en la oriento de la vilaĝo?”

La vilaĝanoj respondis: “Ne troviĝas la oriento de la vilaĝo.”

Li demandis: “Ĉu vi ŝtelis la bovon ne je la tagmezo?”

La vilaĝanoj respondis: “Ne troviĝas la tagmezo.”

La perdinto diris: “Eĉ se vere troviĝus nek la vilaĝo, nek arboj, ĉu povus troviĝi nek la oriento, nek la tempo? Nenio kion vi diras estas kredinda. Ĉu vi vere formanĝis la ŝtelitan bovon?”

La vilaĝanoj do konfesis: “Jes, ni vere manĝis ĝin.”

Tiel kondukas la kontraŭintoj de disciplinoj. Anstataŭ malkaŝi sian kulpon, ili kaŝas ĝin kaj naskiĝos en infero post la morto. La ĉielanoj kaj dioj rigardas per sia magia vido, do oni ne kapablas kaŝi sian kulpon simile al la nekaŝebla ŝtelado de la bovo.

47. IMITI PEPADON

Antaŭe, ĉiuj virinoj en iu regno sin ornamis per ruĝaj lotusfloroj dum la nacia festo.

Tiam la edzino de malriĉulo diris al li: “Mi restos via edzino se vi donos al mi ruĝajn lotusflorojn. Se ne, mi eksigos de vi.”

Antaŭe la malriĉulo povis lerte imiti la pepadon de mandarena anaso. Do pepante kiel mandarena anaso, li glitis en la reĝan lageton por ŝteli ruĝajn lotusflorojn.

La gardisto de la lageto demandis: “Kiu estas en la lageto?”

La malriĉulo pretervole respondis: “Mandarena anaso.”

La gardisto kaptis kaj kondukis lin al la reĝo. Sur la vojo li denove pepadis.

La gardisto diris: “Anstataŭ pepi antaŭe, al kio utilas via nuna pepado?”

Tiel kondukas ordinaraj homoj. Ili faras atencojn kaj diversajn malbonojn dum la tuta vivo kaj neniam lernas bonon por korekti siajn erarojn. Nur kiam ili estas

mortantaj, ili diras: “Mi volas praktiki bonon.” Sed la demonoj perforte kondukas ilin al la reĝo de Morto per forto. Kvankam ili ekvolas praktiki bonon, ili jam ne plu havas bonŝancon por tio. Ili similas al la malsaĝulo, kiu imitis la pepadon de la mandarena anaso nur antaŭ ol atingi la palacon de la reĝo.

48. BESTO KAJ ARBO

Kiam srigalo¹⁹ restis sub arbo, arbobranĉo rompiĝis pro vento kaj falis sur ĝian dorson. Ĝi do fermis la okulojn por ne vidi la arbon kaj tuj forkuris.

Ĝi atingis senarban regionon, restis tie ĝis la vespero kaj ne volis reiri al la antaŭa loko.

Poste, kiam ĝi vidis, ke arbobranĉoj svingiĝas je ventblovo en malproksimo, ĝi tuj reiris al la arbo, dirante, “Ĝi vokas min.”

Ankaŭ malsaĝaj disĉiploj kondutas same. Monaĥiĝinte, ili lernas ĉe instruisto, sed forlasas lin pro ties iometa kulpigo. Poste ili revenas al li post kiam ili kontaktas malbonan instruiston kaj ĉagreniĝas pro tio. Tiaj foriro kaj reveno manifestas ilian malsaĝon.

49. DISPUTO PRI LA TROVITAJ HAROJ

Iam antaŭe, du knaboj sin amuzis en la rivero kaj trovis tufon da haroj sur la fundo de la rivero.

Unu el ili diris: “Jen barbo de ermito.”

La alia diris: “Ne, jen estas la haroj de bruna urso.”

Tiam ermito loĝis ĉe la rivero. La infanoj disputadis senĉese kaj finfine vizitis lin por peti juĝon de li. La ermito tuj elprenis rizon kaj linsemon, metis ilin en la buŝon kaj maĉis. Poste li elkraĉis paston en la manon kaj diris al la infanoj: “Tio, kion mi tenas en la mano, similas al pava fekaĵo.”

La ermito faris respondon ne laŭ la demando, kaj ĉiuj homoj sciis pri tio.

Ankaŭ ordinaraj malsaĝuloj kondutas same. Kiam ili faras predikadon, ili diras sence anstataŭ pri la ĝusta temo, simile al la ermito mokita de ĉiuj homoj pro la respondo ne konforma al la demando. Sensecaj diroj ankaŭ kaŭzas similajn rezultojn.

50. KURACI ĜIBON

Iam antaŭe, iu suferis de ĝibo kaj vizitis kuraciston por resaniĝi. La kuracisto ŝmiris buteron sur lian korpon, tenis lin inter du tabuloj kaj kunpremis la tabulojn per forto, sed tute ne atendis, ke la okuloj de la ĝibulo tuj elĵetiĝas pro la sufero.

Ankaŭ malsaĝuloj en la mondo tiel kondutas. Ili faras diversajn malbonojn per mortigado kaj komercado de vivestaĵoj por ĉasi feliĉon kaj meriton. Kvankam ili sukcese prilaboras iom da profito, tamen tio ne povas kompensi ilian malutilon. Ili renaskiĝos en la infero post la morto kiel la ĝibulo kies okuloj estas elĵetitaj pro sufero.

51. KOMUNA SERVISTINO

Kvin viroj kune aĉetis servistinon. Unu el ili ordonis ŝin: “Lavu miajn vestaĵojn.” Ankaŭ alia faris saman ordonon al ŝi. La servistino respondis, ke ŝi unue lavos por la unua. La dua viro koleris kaj insultis ŝin: “Mi aĉetis vin kune kun la aliaj. Kial vi lavos unue nur por li?” Li skurĝis la servistinon dekfoje, do ĉiu el la aliaj same skurĝis ŝin.

La Kvin Agregajaĵoj estas samaj. Vivestaĵoj havas la korpon pro la kaŭzo de siaj kleŝoj, kaj la Kvin Agregajaĵoj ĉiam skurĝas ilin per naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo, morto kaj sennombraj afliktoj.

52. MUZIKISTO KAJ LA REĜO

Iam antaŭe, muzikisto ludis muzikon por la reĝo kaj tiu promesis doni al li dek mil monerojn. Poste, kiam li postulis la monon, la reĝo ne plu volis plenumi sian promeson.

La reĝo diris al li: “Antaŭe vi ludis muzikon nur por plaĉi al miaj oreloj. Mi promesis la monon ankaŭ por plaĉi al viaj oreloj.”

Ankaŭ la rezulto de la homa vivo estas sama. Kvankam vivestaĵoj en la mondoj de la homo kaj la ĉielano povas sperti iom da feliĉo, tamen tio estas efemera, detruenda, nereala kaj ne povas daŭri longe simile al sono de muziko.

53. RECIPROKA VENĜO

Iam instruisto havis du lernantojn. Li suferis je piedmalsano, kaj ordonis ambaŭ lernantojn masaĝi po unu el la piedoj aparte de tempo al tempo.

La lernantoj ĵaluzis kaj malamamis unu kontraŭ la alia.

Dum unu el la lernantoj eliris, la alia rompis la piedon masaĝitan de li per ŝtono.

Post kiam li revenis, li ekkoleris pro tio kaj ankaŭ rompis la piedon masaĝitan de la alia por sin venĝi.

Ankaŭ iuj lernantoj de Budhismo kondutas same. La lernantoj de Mahajano riproĉas Teravadon, dum la lernantoj de Teravado reciprokas la riproĉon kontraŭ Mahajano, kaj tiel ili detruas budhajn instruojn de ambaŭ skoloj pri Mahajano kaj Teravado.

54. LA KAPO KAJ VOSTO

Iam vivis serpento. Ĝia vosto diris al la kapo: “Mi devas rampi antaŭe.” La kapo respondis: “Mi ĉiam rampis antaŭe. Pro kio vi subite volas anstataŭi min?” Kiam la kapo rampis antaŭen, la vosto alkroĉis arbon kaj neniel sin movis. La kapo povis fari nenion alian ol obei la voston kaj lasi ĝin rampi antaŭe. Sed pro tio, la serpento sin trudis en fajron kaj mortis de brulo.

Ankaŭ iuj instruistoj kaj lernantoj kondutas same. La lernantoj diras, ke la instruistoj estas maljunaj sed ĉiam gvidas antaŭe, dum la lernantoj estas junaj, do ili devas esti la ĉefoj. Sed pro juneco, la lernantoj ne bone konas disciplinojn kaj ofte kontraŭas ilin. Ambaŭ instruistoj kaj lernantoj renaskiĝos en infero pro la rilato inter si mem.

55. LOJALA SUBULO

Iam antaŭe, reĝo havis lojalan subulon. Dum milito la subulo savis la reĝon el danĝero spite sian propran vivon. Pro tio la reĝo ĝojis, kaj volis donaci al li ĉion deziratan. La reĝo demandis lin: “Kion vi deziras? Mi donacos ĉion ajn al vi laŭ via deziro.”

Sed la subulo respondis: “Kiam vi bezonas iun razi vian barbon, bonvolu lasi min fari tion por vi.”

La reĝo respondis: “Se tio plaĉas al vi, mi plenumos vian deziron.”

Tiu malsaĝulo estis mokita de ĉiuj aliaj. Li postulis nur humilan okupon kvankam li rajtis akiri altan rangon kaj duonan teritorion.

Tiel kondukas malsaĝuloj. Ĉiuj budhoj atingis luminiĝon per malfacilaj praktikadoj dum sennombraj kalpoj²⁰. Estas tiel malfacile akiri la homan vivon, renkonti Budhismon kaj budhan instruon kiel blinda testudo hazarde levas sian kapon tra truo de ligna tabulo sur la maro.

Sed kiam ili havas malfacile atingeblan homan vivon kaj renkontas Budhismon, ili kontentiĝas pri observado de nur malmulte da disciplinoj pro sia malsaĝo. Ili tute ne deziras superan metodon al nirvano. Anstataŭ klopodi por la progreso, ili kontentiĝas nur pri la malĝustaj aferoj.

56. POSTULO AL “NENIO”

Iam antaŭe dum du viroj promenis, ili vidis, ke homo portas ĉaron da sezamo sur la vojo sed neniel povas movi la ĉaron el danĝera loko. La ĉaristo petis: “Helpu min movi la ĉaron el danĝero.”

La viroj demandis: “Per kio vi rekompencos nin?”

La ĉaristo respondis: “Per nenio.”

Ambaŭ viroj helpis movi la ĉaron. Apenaŭ la ĉaro atingis ebenan lokon, iu el ili diris al la ĉaristo: “Donu al ni la rekompencon.”

La ĉaristo respondis: “Nenion.”

La postulanto insistis: “Do donu al ni la Nenion.”

La alia viro diris kun rido: “Li tute ne volas rekompenci nin. Do kial vi ankoraŭ insistas?”

La postulanto respondis: “Li ja promesis la Nenion al ni, do li devas rekompenci nin per ĝi.”

La alia viro diris: “‘Nenio’ estas nur abstrakta vorto, sed tute ne konkreta

objekto.”

Pro kroĉiĝo al “Nenio”, ordinaraj homoj naskiĝas en la stato de Nenio. La tiel nomata “nenio” de la dua homo estas stato de senformo, senvolo kaj senago.

57. PIEDBATI BUŜON DE PRESTIĜULO

Iam estis riĉa alt-aĝulo. Ĉiuj liaj subuloj montris sian respekton por flati lin.

Post kiam li kraĉis, la proksimaj servistoj tuj forviŝis la malpuraĵon per piedo.

Malsaĝa subulo neniam trovis ŝancon por tio. Li do pensis: “Se kraĉaĵo de la prestiĝulo falos sur la teron, ĉiuj forviŝos ĝin per piedo. Do mi devas fari tion la unua tuj kiam ĝi elbuŝiĝos.”

Apenaŭ la prestiĝulo pretis kraĉi, la malsaĝulo levis sian piedon kaj trafis lian buŝon. Pro tio li vundis la lipojn kaj rompis la dentojn al la prestiĝulo.

La prestiĝulo demandis la malsaĝulon: “Kial vi piedbatis min je la buŝo?”

La malsaĝulo respondis: “Se via kraĉaĵo falas sur la teron, la proksimaj flatemuloj forviŝas ĝin per piedo. Kvankam ankaŭ mi volas tiel agi, tamen mi neniam trovis ŝancon. Do por gajni vian plaĉon mi volas piede forviŝi la kraĉaĵon apenaŭ vi

pretas elkraĉi.”

Ĉio okazas laŭ kaŭzo kaj kondiĉo. Se oni klopodas antaŭ la okazo, ili akiras nur ĉagrenon. Do homoj devas kompreni la diferencon inter la ĝusta kaj malĝusta tempoj por sia ago.

58. DIVIDI HEREDAĴON

Iam en la regno Malao vivis kŝatria nobelo. Li suferis de grava malsano kaj sciis, ke li estas mortanta. Li do ordonis siajn du filojn: “Dividu la heredaĵon laŭdece post mia morto.”

La filoj obeis lin, kaj dividis la heredaĵon tuj post lia morto. Sed la pliĝa frato plendis, ke la malpliĝa faris la dividon ne juste.

Tiam stulta maljunulo proponis al ili: “Mi havas bonan metodon, por ke vi dividu la havaĵon tute egale. Disigu ĉion de la heredaĵoj. Kiel fari tion? Vi disduigu ĉiun vestaĵon, teleron kaj botelon, pelvon, urnon, kaj ankaŭ moneron. Tiel vi dividos ĉiujn heredaĵojn tute egale.”

Oni mokridis lin pri la propono.

Alireligianoj erare pratikas diskriminan respondon de debato. Ekzistas kvar metodoj por debato. El ili estas definitiva respondo, ekzemple al la demando, ĉu ĉiuj homoj mortas, oni devas doni definitivan respondon. Al la

demando, ĉu mortintoj renaskiĝas, estas diskrimina respondo: “Homoj ĉesigintaj amon ne plu renaskiĝas.” kaj “Homo kun amo renaskiĝas.” Jen estas diskriminaj respondoj de debato. Se iu demandas: “Ĉu homo estas la plej bona?” Vi devas konfirmi: “Ĉu via demando temas pri la tri malbonaj ekzistecoj aŭ pri la ĉiela ekzisteco? Se via demando temas pri la malbonaj ekzistecoj, homo estas la plej bona. Se via demando temas pri la ĉielanoj, homo estas malpli bona.” Tio estas respondo en demandoj. Se oni demandas pri la dek kvar ignorindaj demandoj, kiel “Ĉu la mondo kaj vivestaĵoj havas limon aŭ ne?”, “Ĉu ili havas komencon aŭ ne?” kaj aliaj, vi devas rezigni respondon. Sed la alireligianoj estas malsaĝaj. Ili sin opinias sufiĉe saĝaj kaj anstataŭigas la kvar respondojn de debato per diskrimina respondo kvazaŭ la malsaĝulo, kiu disduigis eĉ moneron por dividi havaĵon.

59. RIGARDI BOTELFARADON

Iam antaŭe, du viroj iris al metiisto de argilaĵo kaj absorbite rigardis lin fari botelojn per tornilo.

Unu el ili foriris al festeno post nelonge, kaj tie li ĝuis bongustan manĝaĵon kaj ricevis valoraĵon.

La alia daŭre rigardis la botelfaradon. Li pensis: “Mi iros nur post kontentiĝo de la rigardo.” La tempo pasis iom post iom, kaj la suno jam subiĝis, tamen li ankoraŭ ne kontentiĝis de la rigardo. Pro tio li perdis la ŝancon por manĝaĵo kaj vestaĵo.

Ankaŭ malsaĝuloj estas similaj. Ili okupiĝas pri bagatelaj aferoj kaj trovas tion ordinara.

Homoj faras ion hodiaŭ,
kaj alian morgaŭ.
Aperis la Budho, la granda drako,
Kaj lia voĉo tondras tra la tuta mondo.
La darmo pluvas nehaltigeble,
Sed ili ne aŭskultas pro sia kaŭzo.
Ili ne scias la alvenon de la morto,
Kaj perdas la ŝancon al budhismo.

Ili ne povas akiri la valoran darmon,
Sed ĉiam restas en sufero.
Ili ignoras la ĝustan darmon,
Pro sia rigardo al botelfarado.
Pro la vidpunkto de eterneco,
Tiel ili perdas ĉiajn profitojn el la
Darmo,
Kaj nenian havos liberiĝon.

60. BILDO DE ORO

Iam antaŭe, malsaĝulo iris al lageto, hazarde vidis bildon de oro sur la akvofundo kaj kriis, ke troviĝas oro en la akvo. Li tuj enakviĝis kaj fosis ŝlimon por trovi la oron, sed klopodis vane ĝis elĉerpiĝo. Li devis eliri por ripozi. Kiam la akvo klariĝis, la bildo de oro refoje aperis en la akvo. Li do denove enakviĝis por daŭrigi la serĉadon, sed ankoraŭ trovis nenion.

Tiam lia patro venis al li. Vidinte tion, la patro demandis: “Kion vi faris, ke vi estas tiel laca?”

Li respondis: “Troviĝas oro sur la akvofundo! Mi enakviĝis por preni ĝin el la ŝlimo, sed nenion trovis ĝis elĉerpiteco!”

Pririgardinte la bildon de oro sur la akvofundo, la patro eksciis, ke la oro troviĝas sur la arbo kaj ĵetas sian bildon en akvo. Li do diris al la filo: “Kompreneble birdo portis ĝin kaj faligis ĝin sur la arbon.”

La filo do grimpis sur la arbon laŭ propono de la patro kaj vere trovis oron.

Ankaŭ malsaĝaj homoj en la mondo tiel kondutas. Ili prenas egoon kiel sin mem en la senegoeco, same kiel la malsaĝulo prenis bildon de oro kiel oron mem kaj vane klopodis por trovi ĝin, sed gajnis nenian rezulton.

61. LA KREAĴO DE BRAMA DISĈIPLO

Ĉiuj bramanoj diris: “La Bramo estas la patro de la mondo. Li kreis ĉion en la universo kaj estas la nura reganto de la mondo.”

Iu el la bramaj disĉiploj diris: “Ankaŭ mi povas krei ĉion.” Li estis sufiĉe malsaĝa, tamen li deklaris, ke li estas plena de saĝo. Li diris al la Bramo: “Ankaŭ mi volas krei ĉion.”

La Bramo respondis: “Ne tiel pensu. Vi ne kapablas tion fari.”

La disĉiplo ekagis malgraŭ la deadmono de la Bramo.

Vidinte la kreaĵon de la disĉiplo, la Bramo diris: “Vi faris la homan kapon tro granda dum la kolon tro maldika; vi faris la manojn tro grandaj dum la brakojn tro mallongaj; vi faris la piedojn tro malgrandaj dum la kalkanojn tro grandaj, simile al tiuj de piŝaĉo²².”

De tio oni devas scii, ke ĉio estiĝas laŭ siaj propraj kaŭzo kaj kondiĉo, sed tute ne

estas kreita de la Bramo.

La predikado de budhoj estas libera de du ekstremaj vidpunktoj, nome eterneco de mondo kaj nihilismo. Ankaŭ la Noblaj Okeraj Vojoj estas samaj. Sed alireligianoj sin kroĉas al la vidpunktoj de eterneco kaj nihilismo kiam ili trovas la mondon tiaj. Ili trompas la homojn en la formo de predikado, tamen ilia instruo kontraŭas la veron.

62. MANĜI FAZANAĴON POR RESANIĜO

Iam antaŭe, iu suferis je serioza malsano. Kuracisto diagonzis lin kaj proponis, ke li konstante manĝu fazanaĵon por resaniĝi.

La malsanulo do aĉetis fazanon en la bazaro, sed post kiam li finmanĝis unu, li ne plu manĝis aliajn.

Poste, kiam la kuracisto vidis la malsanulon, li demandis: “Ĉu vi jam resaniĝis?”

La malsanulo respondis: “Vi proponis al mi konstante manĝi fazanaĵon. Do mi manĝis unu, sed ne plu kuraĝis manĝi pliajn.”

La kuracisto riproĉis lin: “Se vi jam manĝis unu, pro kio vi ne manĝis pliajn? Ĉu vi povus resaniĝi nur per unu fazano?”

Ankaŭ alireligianoj tiel kondutas. Aŭdinte la instruon de kuracistosimilaj budhoj kaj bodisatvoj, ke oni devas kompreni sian menson, ili kroĉiĝas al vidpunkto pri eterneco kaj opinias, ke

la pasinteco, estanteco kaj estonteco estas konscio kaj neniam variigas nek malestigas, kiel manĝado nur de unu fazano ne povas kuraci malsanon de malsaĝo kaj kleŝo. La budhoj kun supera saĝo instruas alireligianojn, ke ili rezignu la ideon de eterneco. Ĉiuj darmoĝoj estiĝas kaj malestiĝas konstante, kiel povus ekzisti neŝanĝebla konscio? Kiel la kuracisto, kiu proponas la malsanulon daŭre manĝi fazanaĵon por resaniĝi, la Budho ankaŭ komprenigis al vivestaĵoj, ke la darmo ne eternas pro sia variigo kaj ne ĉesas pro sia sinsekvenco, por helpi ilin forigi la alkroĉigon al la kredo pri eterneco.

63. TERURIĜO PRO LA RAKŜASA KOSTUMO

Iam vivis pluraj aktoroj en la regno Gandaro. Kiam ili kune vojaĝis al alia loko por sin savi de la serioza malsatego, ili preteriris la montaron Parasino, kie onidire frekventis ferocaj demonoj kaj sangavidaj rakŝasoj²².

Ĉiuj aktoroj tranoktis en la montaro, kie blovis malvarma vento, do ili bruligis fajron kaj kuŝiĝis ĉirkaŭe.

Poste unu el ili sentis malvarmon, li do sin vestis per teatra kostumo de rakŝaso kaj sidiĝis ĉe la fajro por sin varmigi.

Unu el liaj kunuloj vekiĝis kaj tuj teruriĝis kiam li vidis iun en rakŝasa kostumo sidanta ĉe la fajro. Anstataŭ atente pririgardi, li tuj forkuris pro timo. Tio vekis la aliajn, kaj ankaŭ ili ĉiuj diskuris pro timo.

La aktoro en la teatra kostumo same ektimis kaj tuj kuris post siaj kunuloj.

Vidinte lin, liaj kunuloj des pli teruriĝis opiniante, ke la rakŝaso postkuras por kapti

ilin. Ili kuregis senĉese preter montoj, tra riveroj kaj trans valojn. Iliaj korpoj vundiĝis kaj ili elĉerpiĝis ĝismorte. Nur je la tagiĝo ili konsciis, ke la postkuranto tute ne estas rakŝaso.

Ĉiuj mondanoj estas samaj. Restante en la suferaj statoj de afliktiĝo kaj malsato, ili strebas al la supera stato eterna, feliĉa, pura kaj libera. Sed ili prenas la kuniĝon de kvin sensoj kiel sian memon, kaj pro tio ili vagas en la metempsikozo pelate de kleŝoj, falas en la abismon de tri suferaj vivestecoj kaj ne povis sin liberigi. La taĝiĝo signifas finiĝon de la nokto de senfina cirklo de naskiĝo kaj morto kiam ili per la propra saĝo scias bone, ke la kuniĝo de la kvin sensoj ne estas la vera egoo.

64. “DEMONO” EN LA MALNOVA DOMO

Iam estis malnova domo. Laŭdire ĝin ofte hantis kruela demono, do neniu kuraĝis dormi ene pro timo.

Tiam, viro sin pretendis kuraĝa kaj deklaris: “Mi volas tranokti en la domo.” Dirinte, li tuj endomiĝis por pasigi la nokton.

Poste, alia viro sin pretendis multe pli kuraĝa ol la antaŭa. Ankaŭ li aŭdis, ke la domo estas frekventata de feroça demono. Li volis iri en la domon.

Apenaŭ la posta viro ekpuŝis la pordon, la antaŭa enĉambriĝinto opiniis, ke alvenas demono, kaj li tutforte puŝis la pordon por bari la demonon. La posta viro ankaŭ opiniis, ke en la domo estas la demono. Li do luktis kun la alia ĝis tagiĝo. Nur kiam ili intervidiĝis unu la alian, ili eksciis, ke neniu el ili estas demono.

Ankaŭ mondanoj estas samaj. Ili renkontiĝas nur pro la antaŭaj kaŭzoj, en kiuj neniu estas la reganto. Neniu povas

trovi sian egoon per esploro, tamen homoj prenas sian imagon kiel veron kaj reciproke konflikta, same kiel la viroj en la rakonto.

65. KVINCENT KNELOJ

Iam vivis virino diboĉa, malĉasta kaj ege volupta. Ŝi malamegis la edzon kaj elpensis diversajn metodojn por mortigi lin, sed neniam sukcesis.

Kiam la edzo devis vojaĝi al la najbara lando kiel sendito de sia lando, al la virino subite venis malica ideo. Ŝi miksis venenon en knelojn por mortigi lin. Ŝi mensogis: “Nun vi iros malproksimen. Mi timas, ke mankos al vi manĝaĵo, do mi speciale faris por vi kvincent knelojn kiel manĝaĵon. Sed ne manĝu ilin antaŭ ol vi atingos alian landon kaj havos nenion alian por manĝi.”

La edzo obeis ŝin kaj tuŝis neniom el la kneloj ĝis li atingis alian landon. Kiam li tranoktis en arbaro, li sin kaŝis sur arbo por eviti sovaĝajn bestojn, sed forgesis la knelojn kaj lasis ilin sub la arbo.

Hazarde okazis priŝtelado en tiu nokto. Kvincent ŝtelistoj iris ankaŭ en la arbaron, ŝtelinte trezorojn kaj kvincent ĉevalojn de la reĝo. Ili ĉiuj suferis de malsato kaj soifo pro forkurego. Vidinte la knelojn sub la

arbo, ili manĝis po unu. La veneno en la kneloj estis tiel forta, ke ili ĉiuj perdis la vivon momente.

La viro subiris de la arbo ĉe la tagiĝo. Vidinte, ke ĉiuj ŝtelistoj kuŝas mortaj sub la arbo, li afekte vundis la kadavrojn per tranĉilo kaj sagoj. Poste, li kolektis la ĉevalojn kaj trezorojn, kaj kondukis la bestojn al sia celloko.

La reĝo de la lando postkuris la ŝtelistojn laŭ la piedsignoj akompanate de multaj homoj kaj renkontis lin sur la vojo.

La reĝo demandis lin: “Kiu vi estas? Kaj de kie vi havigis al vi la ĉevalojn?”

Li respondis: “Mi venis de alia lando kaj renkontis la ŝtelistojn sur la vojo. Mi luktis kun ili per tranĉilo kaj sagoj, kaj mortigis ĉiujn sub la arboj, do mi kolektis la ĉevalojn kaj trezorojn por iri al vi. Se vi ne kredas pri tio, bonvolu sendi iun esplori la lokon, kie ili vundiĝis kaj mortis.”

La reĝo tuj sendis siajn fidelulojn por pririgardi, kaj trovis tion vera. La reĝo ege ĝojis kaj admiris lian raran kapablon. Reveninte al sia lando, la reĝo premiis lin

per alta rango, multaj trezoroj kaj granda feŭdo.

Tiam la malnovaj korteganoj enviis lin pro tio. Ili diris al la reĝo: “Li ja estas alilandano tute ne fidinda. Kiel vi tiel favoras lin per premio multe pli granda ol tio al la malnovaj korteganoj?”

Informiĝinte pri tio, la sendito diris: “Kiu sufiĉe kuraĝas dueli kun mi? Bonvolu iri al la ebena loko por montri vian kapablon.”

Ĉiuj korteganoj teruriĝis kaj neniu el ili kuraĝis dueli kun li.

Poste, en la landon venis feroca leono. Ĝi mortigis pasaĝerojn sur la vojo al la ĉefurbo, kaj neniu plu kuraĝis preteriri.

Tiam la korteganoj interkonsiliĝis kune: “La alilandano diris, ke li estas senkompare brava kaj neniu povas lin venki. Se li povos mortigi la leonon por protekti la landon, tio estos vera miraklo.” Poste, ili faris interkonsenton kaj proponis tion al la reĝo.

Akceptinte ilian proponon, la reĝo tuj donacis tranĉilon kaj bastonon al la sendito

kaj sendis lin mortigi la leonon.

Akceptinte la ordonon, la sendito iris al la leono sin kuraĝiginte. Vidinte lin, la leono tuj feroce sin ĵetis al li hurlante. Li ektimis kaj senprokraste grimpis sur arbon. La leono do levis la kapon al la arbo kun malfermita faŭko. Li estis tiel terurigita, ke li perdis la tranĉilon el la mano. La tranĉilo ĝuste falis en la faŭkon de la leono kaj mortigis ĝin.

Li ekzaltiĝis kaj tuj revenis al la reĝo. La reĝo despli favoris lin.

Ekde tiam, ĉiuj homoj en la lando estimis kaj laŭdis la senditon.

La kneloj en la rakonto estas metaforo de oferaĵo ne laŭdeca; sendito, sankta erudiciulo; vojaĝo al alia lando, ĉiuj ĉielanoj; mortigo al ŝtelistoj estas metaforo de sotapano, kiu klopodas forigi la kvin pasiojn kaj kleŝojn; renkonto kun la reĝo estas metaforo de tio kun la sanktulo; ĵaluzaj malnovaj korteganoj estas metaforo de alireligianoj, kiuj vidinte, ke la saĝuloj povas sin liberigi el la kleŝoj kaj kvin pasioj, faras kalumniadon kaj diras, ke

ne estas tiaj aferoj; la propono por duelo fare de la sendito al malnovaj korteganoj estas metaforo de nekapableco en la lukto de alireligianoj; mortigo al la leono estas metaforo de venko super malicaj demonoj. Oni povas akiri premion de senkroĉiĝo foriginte kleŝojn kaj demonojn. Ĉiama timememo estas metaforo de venko de la malforta super la forta. Kvankam oni ne havas puran menson en la komenco, oni povas havigi al si meriton renkontante kaj farante oferon al sanktaj erudiciuloj.

Oni eĉ povas ricevi tiel grandan meriton per ne laŭdeca oferaĵo, se ne paroli pri ofero el bona intenco. Do ni devas diligente praktiki oferadon en bona ŝanco.

66. RECITI STIRMETODON

Iam antaŭe filo de riĉa prestiĝulo iris al la maro kun komercistoj por kolekti trezorojn.

Li scipovis parkere reciti la stirmetodon de la ŝipo kaj pretendis scii kiel stiri, direkti aŭ haltigi la ŝipon en kirlaĵoj aŭ sur ondegoj de la maro. Do li fanfaronis al la aliaj: “Mi bone scias la stirmetodon sur la maro.”

Aŭdinte tion, ĉiuj kredis lin.

Ne longe post kiam ili ekveturis sur la maron, la stiristo subite mortis de malsano, do la filo de la prestiĝulo fariĝis nova stiristo por lin anstataŭi.

Kiam la ŝipo iris en kirlaĵon, la nova stiristo recitis laŭte: “Oni devas tiel stiri, kaj tiel direkti la ŝipon.” Sed la ŝipo nur turniĝis en la kirlaĵo anstataŭ veturi antaŭen por atingi la lokon, kie estas trezoroj. Ĉiuj komercistoj dronis kune kun la ŝipo.

Ankaŭ ordinaraj homoj tiel kondukas. Ili lernis iom da medita metodo kiel atenti pri la spirado kaj kontempli pri

la malpureco, sed nur scipovas reciti la tekston anstataŭ kompreni la esencon. Kvankam ili ne bone scias pri la meditado, tamen ili pretendas, ke ili bone scias la meditado, kaj eĉ instruas aliajn. Oni konfuziĝas pro lia misgvido, eraras pri la meditado kaj klopodas vane dum longaj jaroj. Ili similas al la malsaĝulo, kiu dronigis siajn kunvojaĝantojn en la maro.

67. GEEDZOJ SILENTE MANĜAS KUKON

Iam antaŭe, paro da geedzoj havis tri kukojn. Post kiam ili manĝis po unu kuko, restis nur unu. Do ili interkonsentis: “Kiu parolos unue, tiu ne rajtos manĝi la lastan kukon.” Por la kuko neniu el ili parolis plue post la interkonsento.

Rabisto entrudiĝis en la ĉambron post momento kaj forportis ĉiujn havaĵojn.

Sed la geedzoj nur gapis silente anstataŭ paroli pro la antaŭa interkonsento. Vidinte tion, la rabisto ekatencis la edzinon eĉ antaŭ la edzo. La edzo ankoraŭ sin tenis silenta kvankam li vidis tion.

La edzino ekkriis pri la rabisto, kaj riproĉis sian edzon: “Malsaĝulo! Kial vi ne krias al la rabisto nur pro la kuko?”

La edzo aplaŭdis per la manoj kaj diris kun rido: “Virinaĉo! Jen mi havos la kukon, kaj donos neniom al vi.”

Neniu el aliaj homoj povis sin deteni de rido kiam ili aŭdis pri tio.

Tiel kondukas ordinaraj homoj. Ili sin

ŝajnigas trankvilaj kaj silentaj por famo kaj profito, sed suferas de atenco fare de diversaj rabistoj de siaj kleŝoj, perdas la bonon kaj falas en tri amarajn vivestecojn. Kvankam ili deziras liberiĝon, tamen ili absorbiĝas pri amuziĝo laŭ la kvin pasioj. Ili eĉ ne scias la danĝeron droni en la suferego, tutsimile al la malsaĝulo.

68. SINVENĜO

Iam antaŭe, iu ege afliktiĝis pro malamo al alia homo. Oni demandis lin: “Pro kio vi tiel afliktiĝas?” Li respondis: “Iu atencis min, sed mi ne kapablas min venĝi. Mi ne scias, kiel mi povas fari malutilon al li, do mi afliktiĝas ĝuste pro tio.”

La aliulo respondis: “Nur per Vetalaj Sorĉvortoj²³ vi povas venĝi vin kontraŭ li. Sed la sorĉarto havas malavantaĝon. La fatalaĵo trafos vin antaŭ ol atingi lin.”

Aŭdinte tion, la viro ekĝojis kaj tuj petis: “Bonvolu instrui min pri la sorĉvortoj. Mi preferas venĝi min kontraŭ li eĉ se mi suferas de tio.”

Ankaŭ mondanoj tiel kondukas. Ili volas trovi Vitalajn Sorĉvortojn por sin venĝi kontraŭ aliaj pro kolero, sed antaŭ ol malutili al la aliaj, ili mem suferos de tio kaj falos en amarajn statojn de inferano, besto kaj malsata spirito, tute simile al la malsaĝulo.

69. RAPIDA MANĜADO

Iam antaŭe, iu vojaĝis de la norda Hindio al la suda. Li longe loĝis tie kaj prenis lokan junulinon kiel sian edzinon.

Foje, apenaŭ la edzino pretigis manĝaĵon por li, li ekkomencis englutegi haste spite varmegon.

La edzino surpriziĝis pro tio kaj demandis: “Ĉi tie troviĝas neniu rabisto por prirabi vin. Pro kio vi manĝas tiel rapide anstataŭ dece kaj malrapide?”

Li respondis: “Jen sekreto. Mi ne rajtas malkaŝi tion al vi.” Aŭdinde tion, la edzino des pli miris kaj insistis pri la demando.

La edzo ellasis la respondon post longa hezito. Li diris: “Ekde mia avo ni havas metodon por manĝi rapide. Nun mi imitas tion kaj manĝas haste.”

Ankaŭ mondanoj kondutas same. Ili ne komprenas la veron kaj ne povas distingi bonon de malbono, sed senhonte faras diversajn malbonojn, dirante, ke ili tiel kondutas ekde sia avo kaj ne rezignos tion ĝismorte. Ili similas al la malsaĝulo,

kiu imitis rapidan manĝadon, opiniante, ke tio estas bona metodo.

70. GUSTUMI MANGOJN

Iam riĉa prestiĝulo volis manĝi mangojn, li do sendis serviston al ĝardeno de alia homo por aĉeti. Li ordonis: “Vi devas aĉeti la fruktojn dolĉajn kaj bongustajn.” La servisto obeis lin, kaj iris al la vendisto kun mono.

La vendisto diris: “Ĉiuj mangoj de tiu ĉi arbo estas dolĉaj kaj bongustaj. Neniu el ili estas malbongusta. Se vi gustumos unu, vi bone scios pri tio.”

La aĉetanto respondis: “Mi devas gustumi ĉiujn antaŭ la aĉeto. Se mi gustumos nur unu, kiel mi scias, ke ankaŭ la aliaj bongustas same?” Li do elektis mangojn kaj gustumis ĉiujn antaŭ ol porti ilin hejmen. Kiam la riĉulo vidis mordsignojn, li sentis naŭzon kaj forĵetis ĉiujn fruktojn eksteren.

Ankaŭ mondanoj kondutas same. Ili aŭdas, ke observado de disciplinoj povas havigi al ili riĉecon kaj feliĉon, doni al ili bonfartecon kaj liberigi ilin el sufero, sed ili ne volas kredi tion, dirante: “Se

oni povas akiri feliĉon per almozdono, mi kredos tion nur kiam mi akiros feliĉon.” Vidinte la nunajn riĉecon kaj mizerecon kaŭzitajn de la antaŭaj karmoj, ili ne volas kompreni tion per la teorio de kaŭzo kaj efektivo, sed nur kredas pri sia sperto. Tuj post ilia morto, ĉiuj iliaj riĉaĵoj perdiĝas kvazaŭ la morditaj amalakoj.

71. BLINDIĜO PRO LA EDZINOJ

Iam iu prenis al si du edzinojn. Se li intimiĝis al unu, la alia koleris. Li ne povis ĉesigi ilian konflikton, kaj devis kuŝi surdorse inter ili dum la nokto. Lia domo likis en iu nokto kaj akvo kaj koto falis en liajn okulojn. Pro la antaŭa interkonsento, li ne kuraĝis sin movi por eviti tion, do li blindiĝis pro malpuraĵo en la okuloj.

Ankaŭ mondanoj tiel kondutas. Ili intimiĝas al maliculoj, praktikas maldecaĵon, kaŭzas malbonan karmon, falas en tri amarajn vivestecojn kaj perdas la okulojn de saĝo simile al la malsaĝulo, kiu perdis ambaŭ okulojn pro la edzinoj.

72. BUŜO DA MILIO

Iam antaŭe, iu vizitis la gepatrojn de sia edzino kaj vidis la edzinon pisti milion. Li do iris al ŝi kaj ŝtele metis milion en la buŝon. Kiam la edzino vidis lin kaj volis paroli kun li, li ne povis respondi ĉar lia buŝo estis plena de milio. Pro honto li ankaŭ ne kuraĝis eligi la milion. Li do povis fari nenion ol teni sin muta.

Vidinte lin muta, la edzino palpis lin kaj opiniis, ke ŝveliĝis lia buŝo. Ŝi do raportis al sia patro: “La buŝo de mia edzo subite ŝveliĝis tiel, ke li eĉ ne povas paroli.”

La bopatro tuj alvenigis kuraciston por kuraci lin. La kuracisto diris: “Tio estas la plej grava malsano. Li povos resaniĝi nur se mi disigos liajn lipojn.” Do la kuracisto disigis liajn lipojn per tranĉilo. Je tio, la milio fluis el lia buŝo, kaj lia ŝtelado malkovriĝis.

Ankaŭ mondanoj tiel kondutas. Ili faras malbonon kaj rompas disciplinojn, sed kaŝas tion anstataŭ konfesi sian kulpon.

Pro tio ili falas en amarajn statojn de inferano, besto kaj malsata spirito, simile al la malsaĝulo, kiu ne eligis milion pro honto sed malkaŝis sian kulpon post disiĝo de siaj lipoj.

73. MENSOGO PRI MORTO DE LA ĈEVALO

Iam iu rajdante sur nigra ĉevalo partoprenis en milito kontraŭ banditoj sed li ne kuraĝis tion fari pro timo. Li do malpurigis sian vizaĝon per sango kaj kuŝis inter kadavroj por sin ŝajnigi morta. Lia ĉevalo estis forkondukita de alia homo. Post kiam la armeo foriris, li volis reveni hejmen. Li do detranĉis la voston de blanka ĉevalo kaj portis ĝin kune kun si.

Post lia reveno, oni demandis lin: “Kie estas via ĉevalo? Kial vi revenis sen ĝi?” Li respondis: “Mia ĉevalo mortis, kaj mi alportis nur ĝian voston.” Ili diris: “Via ĉevalo estis nigra. Kiel ĝi havis blankan voston?” Li povis respondi nenion kontraŭ tio kaj estis mokita de aliaj.

Ankaŭ mondanoj kondutas same. Kvankam ili diris, ke ili kondutas bone, praktikas kompatemon kaj abstinas de viando kaj alkoholaĵo, sed ili faras mortigon kaj venenigon al vivestaĵoj. Kun pretendo pri bono ili faras ĉion malbonan,

simile al la malsagulo, kiu mensogis pri la mortinta ĉevalo.

74. EVITI PUNON

Iam reĝo publikigis leĝon, ke ĉiuj bramanoj kaj alireligianoj en lia regno devas sin lavi puraj; alie, oni punos ilin per diversaj pezaj laboroj.

Iu bramano portis malplenan akvujon kaj pretendis sin pure lavita. Se oni donis akvon al li, li tuj forverŝis ĝin, dirante: “Mi ne lavos refoje. Lasu la reĝon lavi al si mem.”

Por eviti la punon de la pezaj laboroj laŭ la leĝo, li pretendis sin pura, sed fakte li tute ne sin lavis.

Ankaŭ vulgaraj monaĥoj kondutas same. Kun kalva kapo kaj tinkturitaj vestaĵoj, ili kondutas kontraŭ disciplinoj, sed pretendas observi la disciplinojn, kun intenco akiri profiton kaj eviti servon al la reĝo. Kvankam ili ŝajnas ŝramano, tamen ili ne havas veran meriton, kvazaŭ malplena botelo, kiu havas nur eksteran formon.

75. PERDO DE AMBAŬ URNO KAJ KAMELO

Iam antaŭe, iu tenis sian grenon en urno. Lia kamelo etendis la kapon en la urnon por manĝi sed neniel povis eligi ĝin. Ankaŭ la mastro povis fari nenion kontraŭ tio. Li do dronis en granda ĉagreno.

Tiam maljunulo venis al li kaj proponis: “Ne ĉagreniĝu. Mi instruos al vi kion fari. Vi povos tuj elpreni la kamelan kapon per mia metodo. Detranĉu la kamelan kapon kaj ĝi tuj eliĝos.”

La homo detranĉis la kamelan kapon laŭ la propono. Tiel li mortigis la kamelon kaj ankaŭ devis rompi la urnon por elpreni la kamelan kapon. Ĉiuj priridis lian malsaĝon.

Ankaŭ ordinaraj homoj kondukas same. Kun deziro al iluminiĝo kaj strebo al la celo de trijano²⁴, ili devas observi disciplinojn kaj eviti ĉiujn malbonojn, sed ili rompas la disciplinojn pro avido al la kvin sensobjektoj. Rompinte la disciplinojn, ili rezignas la celon de trijano

kaj faras ĉion malbonan laŭplaĉe. Ili perdas
kaj la disciplinojn kaj la celon, simile al la
malsaĝulo, kiu perdis kaj siajn kamelon kaj
urnon.

76. ASPIRO AL REĜIDINO

Iam antaŭe, kiam kamparano vojaĝis en la ĉefurbo, li vidis, ke la reĝidino estas eksterordinare ĉarma. Li do aspiris ŝian manon tagnokte kaj neniel povis sin deteni de tio. Li deziregis kontakti ŝin, sed neniel povis trovi aliron por realigi sian deziron. Pro tio li vakskoloriĝis kaj eksuferis de grava malsano.

liaj parencoj kaj amikoj demandis pri la kaŭzo de la malsano kiam ili vizitis lin.

Li respondis: “Mi vidis la ĉarman reĝidinon antaŭ nelonge kaj deziregis kontakti ŝin. Sed mi neniel povis elpensi bonan metodon por tio, do mi malsaniĝis pro sopirego. Se mia deziro ne realiĝos, mi ne povos eviti morton.”

La amikoj diris: “Ne maltrankviliĝu! Ni elpensos bonan metodon por realigi vian deziron!” Tagon poste, ili revenis al li kaj diris: “Ni jam kontaktis la reĝidinon por vi, tamen ŝi ne konsentis pri via deziro.”

Aŭdinte tion, la kamparano ekridis de ĝojo. Li diris, ke li certe povos havigi la

reĝidinon al si.

Ankaŭ malsaĝuloj en la mondo kondukas same. Anstataŭ distingi la sezonojn inter printempo, somero, aŭtuno kaj vintro, ili semas en vintro por havi rikolton, sed klopodas vane, rikoltas nenion kaj ankaŭ perdas ĉiom da semoj. Kun nur iom da merito la malsaĝuloj sin opinias perfektaj kaj baldaŭ luminiĝontaj, simile al la kamparano aspiranta kontakton kun la reĝidino.

77. MELKI VIRAZENON

Iam homoj en iu izolita lando neniam vidis azenon. Ili nur aŭdis, ke azena lakto estas bongusta, sed neniu konis la beston. Foje, kelkaj homoj havigis al si virazenon kaj konkure kaptis ĝin por melki. Iuj kaptis ĝian kapon, iuj kaptis ĝian orelon, iuj kaptis ĝian voston, iuj kaptis ĝian hufon kaj iu eĉ kaptis ĝian penison. Ili ĉiuj deziregis melki ĝin por gustumi lakton la unua. Tiu, kiu kaptis la azenan penison, opiniis, ke ĝi estas mammo de la azeno. Li do forte premadis ĝin por melki lakton. Finfine ili ricevis neniom da lakto ĝis elĉerpiĝo. Ili klopodis vane, ricevis nenian rikolton kaj estis mokitaj de la tuta mondo.

Ankaŭ iuj ordinaruloj de aliaj religioj tiel kondutas. Ili aŭdas pri la praktiko al sanktiĝo, sed ne scias kiel ĝuste praktiki ĝin. Do ili klopodas pri la nefarindaĵo laŭ sia kaprico, havas diversajn herezajn vidpunktojn, sin turmentas per nudeco kaj malsato kaj eĉ sin ĵetas en fajron. Fine, ili falas en la amaran vivestecon pro siaj

herezaj vidpunktoj, simile al la malsaĝuloj,
kiuj vane strebis por la lakto.

78. HASTEMA FILO

Iam antaŭe, patro diris al sia filo dum la nokto: “Morgaŭ ni kune iros al la vilaĝo por ion alpreni.”

Aŭdinte tion, la filo sole iris al la vilaĝo frumatene sen demandi la patron. Atinginte la cellokon, li elĉerpiĝis de longa irado, sed ne trovis tion, kion li devis porti. Kaj krome, li preskaŭ mortis de malsato kaj soifo pro manko de manĝaĵo. Fine li povis fari nenion alian ol reveni al la patro.

Vidinte, ke li revenis, la patro kulpigis lin: “Kiel malsaĝa vi estas! Pro kio vi iris sole sen mi kaj klopodis vane? Oni mokos vin pri tio.”

Ankaŭ ordinaraj homoj kondukas same. Kvankam ili razas la harojn kaj barbon, sin vestas per la monaĥaj roboj kaj fariĝas monaĥoj, sed ili ne lernas de bonaj instruistoj metodon por atingi liberiĝon, kaj akiras neniom da meritoj per meditado kaj praktikado. Pro tio ili perdas ĉiujn ŝancojn atingi la ŝramanajn fruktojn. Ili similas al la malsaĝulo, kiu iris kaj revenis senfrukte,

kaj ankaŭ vane suferis de laceco. Kvankam ili havas formon de ŝramanoj, tamen ili atingas neniom da sukceso.

79. PORTI BENKOJN POR LA REĜO

Iam antaŭe, reĝo volis iri en la Senĉagrenan Ĝardenon por sin amuzi. Li ordonis al iu subulo: “Portu benkon al la ĝardeno por mi ripozi.”

La subulo hontis tion fari, kaj respondis: “Mi ne kapablas porti ĝin mane. Mi preferas porti dorse.” La reĝo tuj ordonis meti tridek ses benkojn sur la dorson de la subulo, por ke tiu portu ilin al la ĝardeno. Pro tio la subulo estis mokita de aliaj.

Ankaŭ vulgaruloj kondutas same. Vidinte haron de virino sur la tero, ili ne volas forpreni, dirante, ke ili observas la disciplinojn, sed pro allogo de la kleŝo ili ne plu abomenas la tridek ses malpuraĵojn kiel haron, vilon, ungon, denton, fekaĵon, pison kaj aliajn, kaj tenas ilin ĉiuj firme senhonte ĝis la morto. Ili similas al la malsaĝulo, kiu portis benkojn.

80. KLISTERO

